

BULGARA

8-9-1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

90

jarojn

BKP



DEKLARACIO

DE LA PARLAMENTO DE POPOLA RESPUBLIKO BULGARIO RESPONDE AL LA ALVOKO DE LA SUPERA SOVETO DE USSR AL LA PARLAMENTOJ KAJ LA POPOLOJ EN LA MONDO

La Parlamento de Popola Respubliko Bulgario arde subtenas kaj entute aligas al la Alvoko de la Supera Soveto de USSR al la parlamentoj kaj la popoloj en la mondo.

La Alvoko estas ankoraŭ unu konvinka elemento pri la pacama Lenina ekstera politiko de la sovetia ŝtato, de la programo por paco, aprobita fare de la XXVI kongreso de KPSU. Ĝi ja estas insista alvoko al la popoloj, adresita en momento de pliakrigitaj politika streĉo en la mondo, provokita de agresemaj imperiismaj medioj, alvoko, kiu spegulas la profundan maltrankviliĝon de la sovetia popolo pri la sorto de la tuta homaro kaj la sinsekvajn strebojn de Sovetunio por bridigo de la militadeptoj, por ke la mondo estu savita de nuklea katastrofo.

La parlamento de Popola Respubliko Bulgario unuanime konsentas, ke la plej grava tasko de nia nuntempo estas entrepreni senprokrastajn kaj aktivajn agojn kontraŭ la vetarmado, por malarmado kaj plifortigo de la internacia sekureco. Ni senrezerve aligas al la alvoko de la Supera Soveto de USSR al la leĝdonaj organoj de aliaj landoj insisti definitive pri intertraktoj por malebligi novan etapon de raket-nuklea vetarmado. Hodiaŭ ne ekzistas kaj ne povas ekzisti alia prudenta maniero por la solvo de diskuteblaj problemoj, kiom ajn komplikaj kaj akraj ili estu, krom dialogo kaj intertraktoj — intertraktoj honestaj, egalrajtaj, sen kiaj ajn anticipaj kondiĉoj aŭ pruvoj pri diktaĵo, konsiderante la egalan sekurecon de la ŝtatoj.

La kreskanta militminaco kaj la vetarmado ne ebligas la ekziston de senpartiaj kaj indiferentaj observantoj. Kvardek jarojn post la insida atako de la hitlera faŝismo kontraŭ la sovetia lando la severa leciono de la historio avertas, por ke la tragedio ne ripetigu.

Ni profunde kredas, ke la parlamentoj elektitaj de la popoloj haj agantaj je ilia nomo, respondos pozitive al la Alvoko de la Supera Soveto de USSR kaj kontribuos al la forigo de la danĝero, minacanta nian planedon. Ni estas konvinkitaj, ke ĉiuj, al kiuj estas karaj la paco, la sekureco kaj la feliĉa estonto de la homaro, kontribuos al la batalo por antaŭforigo de nova mondmilito.

La Parlamento, konforme al la Konstitucio kontribuos plu al la fortikiĝo de la monda paco kaj al interkompreniĝo inter la popoloj. Responde al la decidoj de la Dekdua Kongreso de la Bulgara Komunista Partio, Popola Respubliko Bulgario kune kun Sovetunio kaj la ceteraj landoj de la socialisma komunumo, samkiel kun la pacamaj fortoj en la mondo, strebos ankaŭ estonte kontribui al la stabiligo de la malstreĉiĝo, al plifortigo de la sekureco kaj la kunlaborado inter la popoloj de la Balkanoj, en Eŭropo kaj en la tuta mondo.



KATEGORIE „NE!“ AL LA NEŬTRONA PROVOKO

La decido de la usona prezidento Reagan pri produktado de neŭtronaĵ bombaj elvokis ĉiam pli kreskantan ondon de indigno kaj malkonsento. Politikaj kaj sociaj agantoj, la demokratia gazetaro de ĉiuj anguloj de la planedo pritaksas tiun kriman paŝon de Vaŝington kiel eksterordinare gravan danĝeron por la paco en la mondo, por la homa vivo. La malbonaŭguran decidon pri komenco de produktado de neŭtronaĵ armiloj oni prijuĝas kiel novan pruvon de la aventura politiko de la nuna usona administracio. La progresema publiko diras kategorie „Ne!“ al la neŭtronaĵ armiloj.

La bulgaraj esperantistoj renkontas kun indigno kaj kolero la decidon pri produktado de neŭtrona bombo. Tiu decido maltrankviligas niajn korojn pri la sorto de la tuta homaro kaj instigas nin ankoraŭ pli aktive batali kontraŭ la malhumana politiko de la usona administracio kaj ĝiaj mortigaj militarmiloj.

FOR LA NEŬTRONAN BOMBON!

NI GARDU LA PACON KAJ LA HOMAN VIVON!



TORÇO DE NOVA ERAO

(OKAZE DE LA 90-JARIĜO DE BKP)



La kongreso de Buzluĝa* kaj ĝiaj historiaj decidoj estas vivaj kaj freŝaj en la memoro de nia popolo, ĉar ili estas nedisigeb-laj de la revoluciaj transformiĝoj de la socio; ĉar ili skizis klaran perspektivon de la socialista movado kaj proklamis, ke nur la laborista klaso frunte al la revolucia marksisma par-tio estas la forto, kiu povas liberigi la sacion el sub la jugo de la kapitalo kaj realigi la socialismajn principojn. Jen kial ni konsideras la 2an de aŭgusto 1891 kiel unuan tagon de la komunista movado en Bulgario.

TODOR JIVKOV.

Ĝenerala Sekretario de BKP kaj Prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario

En la dektrijarcenta historio de Bulgario es-tas eventoj, kiuj neniam perdos sian brilon kaj ĉiam emocios niajn korojn.

En la antikva bulgara tero estas unu legenda montopinto, nomata Buzluĝa.* Ĝi estiĝis sim-bolo de abnegacio kaj braveco.

Je la 2a de aŭgusto 1891 sub la centjaraj kverkoj de la hajduta Balkan-montaro renkon-tiĝis entuziasmaj bulgaraj socialistoj sub la gvidado de la plej eminenta en la Balkanoj (laŭ la vortoj de Lenin) marksisto Dimităr Blagoev kaj melis la fundamentojn de revolu-cia marksisma partio. Jam antaŭ naŭdek jaroj Blagoev kaj liaj plej intimaj kunbatalantoj aligis la fus ekestintan bulgaran laboristan klason al la atakanta la fundamentojn de la kapitalo tutmonda proletaro.

Adoptinta la senmortajn revoluciajn ideojn de Marx kaj Engels kaj poste tiujn de Lenin, heredinta la nefinitan epokfaran aferon de la bulgaraj renesanculoj, la Bulgara Komunista Partio jam naŭ jardekojn marŝas laŭ sia mal-

facila kaj glora vojo, konsciante la grandan respondecon pri la historia signifo de sia rolo.

Jam en la partia programo de Buzluĝa oni notis, ke ĝi starigas al si la respondecan tas-kon „plialtigi la konscion de la laborista klaso kaj organizi ĝin por la liberigo de nia socio el sub la nuntempa jugo de la kapitalo kaj realigi la socialismajn principojn ĉe ni“. La partio, fondita de la revolucia genio de Dimităr Blagoev, batalis multajn jarojn por la penetrigo de la socialismaj ideoj en la labo-ristan klason, por organizado de ties klasaj luktoj.

Depost tiam pasis naŭ jardekoj!...

La kuranta jaro estas jubilea. La stelo de tiu legenda Balkan-montara pinto lumos anko-raŭ jarojn kaj jarcentojn por rememorigi al la nunaj kaj estontaj generacioj pri la sen-morta heroaĵo de la unuaj bulgaraj socialistoj.

La unua inter la unuaj — la fondinto de la scienca socialismo en Bulgario — Dimi-tăr Blagoev, jam tiam nomis tiun historian kunvenon Unua Fonda Kongreso de Bulgara Laborista Social-Demokrata Partio.

*) Buzluĝa — montopinto en Balkan-montaro, kie en 1891 okazis la fonda kongreso de la Bulgara Laborista Social-Demokrata Partio (BLSDP).

Kaj nun, kiam pasis jam naŭ jardekoj de la 2a de aŭgusto 1891, hele brilas la historta epokfaro de tiu granda evento — la naskiĝdato de la Bulgara Komunista Partio.


Gloro estas la historia vojo de Bulgario dum tiuj naŭdek jaroj. Falis miloj da herooj, adoptintaj la ideojn de la fondinto ka la gvidanto de la partio de laborista klaso en Bulgario — Dimităr Blagoev. Sub lia saĝa gvidado la partio de la bulgaraj komunistoj dum multaj jaroj batalis abnegacie kaj sindone kontraŭ la kapitalisma sociordo.

En ties naŭdekjara historio BKP verkis helajn paĝojn — Soldata Ribelo ĉe Vladaja en 1919! En Bulgario eklumis la torĉo de

la unua en la monda historio kontraŭfaŝisma ribelo en septembro 1923!...

En la jaroj de la Dua Mondmilito la heroa kroniko de Bulgario riĉiĝis per novaj helaj kaj gloraj paĝoj, kiuj rezultigis la venkon.

La socialisma revolucio en Bulgario je la 9a de septembro 1944 malfermis en la dektrijarcenta historio de la bulgara ŝtato novan eraon — la eraon de la socialismo kaj komunismo. La afero de socialismo en nia lando venkas! La Bulgara Komunista Partio realigis la revojn de Dimităr Blagoev kaj de liaj kunbatalantoj: **BULGARIO ESTAS KAJ ESTOS SOCIALISMA LANDO!**



La Unua Fonda Kongreso de BLSDP en 1891.

STELOJ SUPER BUZLUĞA-PINTO

Malsupre, en la Roza Valo, floras papavoj kaj supre — je 1500 metroj super la marnivelo, sur la montopinto Buzluğa brilas grandega rubena stelo... Ĝi estas simbolo de nova sociordo — revita de avo Blagoev antaŭ naŭdek jaroj; ĝi estas parto de la impona Domo-monumento, konstruita de la dan-kema bulgara popolo omaĝe al la Bulgara Komunista Partio.

Konstruata dum ok jaroj ĉe ege malfacilaj atmosferaj kondiĉoj, tiu unika memorejo jam estas finpreta kaj de malproksime allogas

de la partio. La interna rondo de freskoj estas dediĉita al la periodo ekde la fondiĝo de BKP en 1981 ĝis la venko de la socialisma revolucio en Bulgario je la 9a de septembro 1944. La fonda kongreso de Buzluğa, la luktoj de la partio, la partizana movado kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo, la bonvenigo de la liberiga soveta armeo estas spegulitaj ankaŭ sur la murpentraĵoj. Per la ekstera rondo oni alvokas al krea laboro de l'popolo, al socialismaj transformiĝoj sub la gvidado de BKP.



Fragmento de la mezalkaj freskoj en la Domo-monumento.

la rigardon. Ĝia 70 metrojn alta fostego prezas venkan flirtantan standardon, sur kiu estas muntitaj du rubenaj steloj (ambaŭflanke) — ĉiu po 12 metrojn alta kaj po 6,5 metrojn larĝa. Senpere apud la fostego estas la ĉefa, rondforma konstruaĵo. Ĉe la enirejo — denove venkaj standardoj. En la sole-na salonego brulas eterna fajro kaj en la mezo de la plafono estas la historia alvoko „PROLETOJ DE ĈIUJ LANDOJ, UNUIGU!“ La muroj de la salonegoj estas dekoritaj per mozaikaj freskoj, prezentantaj la plej gravajn momentojn el la historio

Tiel ĝenerale aspektas la Domo-memorejo sur montopinto Buzluğa, monumento kaj tor-ĉo de la glora vojo de la partio. Ĝin konstruis pli ol 70 projektantoj kaj konstruantoj, gvidataj de la prezidanto de la Unuiĝo de Bulgaraj Arkitektoj — ark. Georgi Stojkov, 13 elstaraj pentristoj kaj centoj da sindonaj laboristoj-konstruistoj.

La Domo-memorejo de BKP estas konstruita okaze de la 90-a datreveno de post la fondiĝo de la partio kaj ties tutpopola celeb-rado.

RIMARKINDA VIVO



La 7an de septembro ĉi-jare estis celebrata la 70-jara jubileo de Todor Jivkov — Ĝenerala Sekretario de BKP, prezidanto de la Ŝtata Soveto de PR Bulgario kaj rekonita aganto de la internacia komunista kaj laborista movado.

En la personeco de k-do Todor Jivkov reflektiĝas la valoraj kvalitoj de patrioto, de sincera kaj konsekvenca internaciisto, de digna batalanto por la afero de la libero, paco kaj amikeco inter la popoloj.

La vivo de Todor Jivkov ĉiam estis ligita kun la revoluciaj bataloj de la laborista klaso kaj malriĉaj vilaĝanoj. Naskita en malriĉa kamparana familio en v. Pravec, distrikto de Sofio, hardita en la vicoj de la laborista klaso kiel poligrafia laboristo, ekde siaj junulaj jaroj li ekiras la vojon de la revolucia batalo. En 1928 T. Jivkov estas akceptita kiel membro de Bulgara Komunista Junulara Asocio kaj en 1932 li eniras la Bulgaran Komunistan Partion.

La aktiva revolucia agado dum la longaj jaroj ĉe la kondiĉoj de la konspira batalo kontraŭ la kapitalisma sociordo, monarkio kaj faŝismo metis k-don Todor Jivkov en la

unuajn kaj respondecajn lokojn de la bulgara revolucia movado. Li estis unu el la organizantoj kaj gvidantoj de la socialisma revolucio kaj de ĝia glora venko je la 9a de Septembro 1944.

Fidela filo de la laborista klaso, k-do Todor Jivkov dediĉis siajn fortojn al la konstruado de nova, libera Bulgario, ekirinta la brilan vojon al socialismo kaj komunismo. Multnombraj kaj diversflankaj estas la meritoj de nia unua partia kaj ŝtata gvidanto en tiu direkto. Precipe rimarkinda estas lia kontribuo al la efektiviĝo de la nova Aprila linio de la partio — linio de restarigo de Leninaj normoj de partia vivo, venko kontraŭ la doktrineco kaj skemeco, kontraŭ la metodoj de ordonoj kaj dekretadoj dum la personeckulto, ekzistantaj ĝis 1956. Dank' al la aktiva agado de k-do Todor Jivkov de la 2-a ĝis la 6-a de aprilo 1956 oni okazigis la historian Aprilan Plenkunsidon de BKP. Per la raporto pri la decidoj de la XX kongreso de KPSU kaj la taskoj de la Bulgara Komunista Partio k-do Todor Jivkov markis la periodon de evoluo de la partio kaj la lando — periodo de intensa socialisma kreado en ĉiuj sferoj de la vivo. Todor Jivkov estis ne nur talenta arkitekto de la nova renoviga politiko de la partio, sed ankaŭ ĉefa organizanto kaj realiganto de tiu vivodona Aprila Linio. Pruvo pri la atingitaj sukcesoj de socialisma Bulgario estas ĝia ekonomia potencio, dank' al kiu ĝi enviciĝas inter la plej progresintaj en ekonomia rilato landoj en la mondo.

Fidela kaj konsekvenca disĉiplo de Georgi Dimitrov, k-do Todor Jivkov estas konvinkita adepto de la eterna, nerompebla efika por nia popolo bulgara-s - ĉia amikeco. La komunaj celoj kaj taskoj konekse kun la konstruado de la komunismo unuigas niajn ambaŭ popolojn en nerompeblan, fortikan batalan amikecon, kiu estas mejloŝtono de la tuta politiko de la Bulgara Komunista Partio kaj de la bulgara ŝtato.

Rimarkinda estas la kontribuo de Todor Jivkov por firmigo kaj disvastigo de la internacia laborista kaj komunista movado, per stabiligo de la fortoj de la paco kontraŭ la milito kaj la imperiisma agreso. Eminenta patrioto kaj internaciisto, li havas rimarkindajn meritojn por la firmigo de la paco kaj por la bonaj rilatoj inter la balkanaj landoj, en Eŭropo kaj en la mondo. Por lia kontribuo

al la batalo por paco, li estis honorita per la plej alta rekono de la Monda Packonsilantaro. Kaj pro lia kontribuo al la monda laborista kaj revolucia movado, pro lia merito por la bulgara-sovetia amikeco, oni dekoris lin per la plej altaj sovetiaj ordenoj. Pro lia rimarkinda kontribuo por la konstruado de la evoluinta socialisma socio en nia lando, k-do Todor Jivkov merite estas distingita per plej altaj nialandaj ordenoj.

Pli ol dudek kvin jarojn Todor Jivkov saĝe gvidas la Bulgaran Komunistan Partion kaj la bulgaran ŝtaton. Tion evidentigas la Aprila Linio de la partio en la sfero de la politiko, ekonomio, kulturo, sociala politiko, en la internaciaj rilatoj ktp. Kiam oni parolas pri tiuj sukcesoj, oni ne forgesu, ke ili estas senpere ligitaj kun lia nomo. Nome pro tio li estas amata kaj profunde estimata partia kaj ŝtata gvidanto, juste ricevinta la rekonon de granda teoriulo kaj organizanto, de eminenta aganto de la internacia komunista kaj laborista movado, de digna daŭriganto de la afero de Dimitar Blagoev kaj Georgi Dimitrov.

La bulgaraj esperantistoj estas fieraj deklari, ke en la personeco de k-do Todor Jivkov ili havas sian malnovan fidelan amikon. Ankoraŭ kiel lernanto en Botevgrad li lernis Esperanton en kurso de la akademiano Ivan Krestanov kaj li estis unu el la aktivaj agantoj pri la disvastigo de la Internacia Lingvo inter la junularo.

La bulgaraj esperantistoj fieras ankaŭ pri tio, ke dank' al la Lenina Aprila linio de la partio BEA ne nur renaskiĝis por nova vivo, sed rapide disvolvigis kaj plifirmigis. Hodiaŭ la Bulgara Esperantista Asocio estas unu el la plej bone organizitaj asocioj en la internacia E-movado. Kaj tiujn siajn sukcesojn ĝi ŝuldas al la profunda demokratio kaj internaciismo, manifestitaj de la Bulgara Komunista Partio, de la registaro de Popola Respubliko Bulgario.

Oni diras, ke la sukcesoj beligas la agojn. Tiel ankaŭ la grandaj sukcesoj kaj atingajoj de nia socialisma patrolando hodiaŭ beligas la agojn de k-do Todor Jivkov. Precipe brile ili vidiĝas nun sur la fono de 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato kaj de la glora 90-jariĝo de Bulgara Komunista Partio. Tiuj sukcesoj, raportitaj tiel konvinke kaj klare en la historia XII partia kongreso, refoje pravas la avangardan rolon de BKP, gvidata de la aŭtoritata partia kaj ŝtata gvidanto de PR Bulgario, la eminenta aganto de la internacia komunista movado, la granda kaj fidela amiko de USSR Todor Jivkov.

Kun sincera ĝojo kaj fiero ĉiu bulgara civitano, ĉiu amiko de Bulgario celebras kiel sian feston la 70-jariĝon de k-do Todor Jivkov kaj bondeziras al li firman sanon kaj kreajn fortojn por la bono de la bulgara popolo.

ĤAIM LEVI





TRIUMFU LA POLITIKO DE PACO KAJ PACA KUNEKZISTADO, ONI METU FINON AL LA KOLONIA JUGO. Paroladoj, raportoj, interparoloj kaj eldiro' konekse kun la XV Sesio de la Asembleo de UNO. Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, Sofio, 1960, 168 p.

Enhavas 15 erojn.

NAŬA KONGRESO DE LA BULGARA KOMUNISTA PARTIO. Raporto kaj ferma parolado. Eldonejo de Fremdlingva Literaturo, Sofio, 1967, 184 p.

PACO KAJ SEKURECO POR LA POPOLOJ. Parolado de la Tut-eŭropa Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro en Helsinko, 30 julio 1975. Sofia-Press, Sofio, 1975, 8 p.

RAPORTO DE LA CENTRA KOMITATO DE LA BULGARA KOMUNISTA PARTIO POR LA PERIODO INTER LA X KAJ XI KONGRESOJ KAJ LA ANTAŬ-STARANTAJ TASKOJ, la 29a de marto 1976. Sofia-Press, Sofio 1976, 112 p.

Kun portreto.

SALUTLETERO AL K-DO TODOR JIVKOV

Generala sekretario de la Centra komitato de la Bulgara Komunista Partio
kaj Prezidanto de la Ŝtata Soveto de Popola Respubliko Bulgario

KARA KAMARADO JIVKOV,

La bulgaraj esperantistoj konas kaj alte taksas Vian kontribuon en la batalo kontraŭ la kapitalismo kaj marksismo, samkiel en la konstruado de l'socialismo en nia patrujo. Jam 25 jarojn la sorto de l'Partio kaj la popolo estas nedisigeble ligita kun Vi — la rekonita daŭriganto de l'faro de Dimitar Blagoev kaj Georgi Dimitrov. Sub Via gvidado realigis la testamento de G. Dimitrov: ke nur en daŭro de kelkaj jardekoj Bulgario atingu tion, pri kies realigo aliaj popoloj, ĉe aliaj kondiĉoj, bezonis jarcenton. Nun Popola Respubliko Bulgario vicigas inter la plej evoluintaj landoj en la mondo.

Grandega estas ankaŭ Via kontribuo por la realigo de la vivokrea bulgara-soveta amikeco, al kiu Vi, k-do Jivkov, ĉiam estis plej sincera amiko, konstruanto kaj inspiranto.

En la tuta mondo Vi, k-do Jivkov, ĝuas meritan aŭtoritaton kiel arda batalanto por paco kaj internacia kunlaborado, kontraŭ la minaco de nova, neniiga milito.

Pro ĉio ĉi ni, la bulgaraj esperantistoj, samkiel la tuta bulgara popolo, profunde estimas kaj amas Vin!

En Via persono ni vidas sinceran amikon de la Internacia lingvo Esperanto kaj de la bulgara E-movado: movado gvidata de patriotaj, internaciaj, demokratiaj kaj profunde humanaj principoj de amikeco kaj kompreno inter la popoloj, por paco kaj sekureco en la mondo.

Dank' al niaj variaj internaciaj kontaktoj ni, la bulgaraj esperantistoj, rakontas al la mondo pri la grandegaj sukcesoj de nia popolo laŭ la vojo de socialismo, pri la ĉiutaga disflanko de niaj naciaj kulturo, literaturo kaj arto, pri la pacema politiko de nia popola registaro kaj la Bulgara Komunista Partio ĉekape kun Vi, ĝia generala sekretario.

En la tago de Via 70-jariĝo ni promesas al Vi, kara k-do Jivkov, ke per la Internacia lingvo Esperanto ni plu laboros kaj batalos por triumfo de l' paco kaj la internacia kunlaborado.

Ni, la bulgaraj esperantistoj, elkore deziras al Vi, kara k-do Jivkov, sanon kaj longan vivon, por ke Vi povu ankoraŭ multaj jaroj gvidi nian popolon al novaj venkoj por konstruado de evoluinta socialisma socio.

Akceptu niajn plej sincerajn bondezirojn pri longa vivo, kara k-do Jivkov.

BIOGRAFIO DE IU KANTO



Estas iu kanto, kiun ni ĉiuj konas kaj kantas:
„Kamarada kanto nun eksonu —
kanto, kanto de l'labor'...”

Ni kunligas ĝin kun nia historio, kun nia sorto.
Ĝi ankaŭ havas sian biografion...

En la fino de la pasinta jarcento — la 20an de majo
1882, en Kjustendil naskiĝis Georgi Dimitrov Gora-


nov. Ankoraŭ infano, li komencas muziki. Lia unua instruisto de muziko estas lia patro. Poste li ludas violonon kaj kantas en la lerneja ĥoro de Pedagogia lernejo.

Fininte la lernejon, Georgi forveturas al Zagrebo por studi en la konservatorio, sed grave malsaniĝas kaj mortas tute juna, nur 23-jara...

Filo de laboristo, Georgi Goranov frue ekkonas la socialisajn ideojn. Senco de lia vivo estas la batalo de la laborista klaso kaj li dediĉas siajn muzikaĵojn al la vivo kaj la luktoj de la laboristoj. En la tempo, en kiu Georgi Goranov vivas kaj verkas, formiĝas la bulgara socialista movado. Estas ege necesaj kantoj, kiuj unuigu la laboristojn kaj alvoku al ribelo kontraŭ la kapitalisma sociordo. Kun sia juneca ardo, inspiro kaj talento Georgi Goranov verkas la muzikon de „Kamarada Kanto” laŭ la versoj de la flama komunista aganto Georgi Kirkov — La Majstro. La kanto aperas en 1909 kaj la 24an de majo 1903 estas oficiale plenumita de la „Vagabonda Ĥoro” en Kjustendil sub la direktado de Georgi Goranov. Tre rapide „Kamarada Kanto” estiĝas himno de la laborista klaso, spirita armilo en ĝia klasbatalo. Tiun kanton plenumas ankaŭ la ĥoro de la komunista sekcio de bulgaraj elmigrintoj en Detroit (Usono), kaj la jugoslavaj paraŝutistoj kantis ĝin serblingve dum la Dua Mondmilito...

La kanto estiĝis senmorta laborista himno!...

ANETA MILANOVA,
lernantino



Unuamaja laborista manifestacio. En la unua vico — Dimitar Blagoev — La Avo (olea pentraĵo).



NEPOJ DE HEROAJ RIBELINTOJ

(37 GLORAJ JAROJ EKDE LA VENKO DE LA SOCIALISMA
REVOLUCIO EN BULGARIO)

Antaŭ 40 jaroj la duan de septembro 1941 estis organizita en Rodopi-montaro la unua partizana grupo. La unuaj partizancj estis nepoj de la heroaj ribelintoj kontraŭ la otomanaj tiranoj en aprilo 1876. En tiu grupo partoprenis ankaŭ la 27-jaraĝa esperantisto el vilaĝo Batak Angel Čaušev.

Iom post iom la partizanaj grupoj plimultiĝis kaj unuiĝis en taĉmenton je la nomo de la mortpafita gvidanto de la partio Anton Ivanov. En ĝiaj stabo kaj batalicnoj troviĝis dekoj da esperantistoj, inter kiuj Dimităr Petrov, Ivan Filev, Kosta Atanasov, Vela Peeva, Nikola Mišev, Kiril Tomov k. a.

En ŝanga batalo la taĉmento luktis kontraŭ ĝendarmoj, sabotis transporton de nutraĵoj al la germanofaŝistaj trupoj, detruis vagonojn kaj maŝinojn.


Ili ne nur batalis. Ofte kunvokis kunvenojn por la arbarlaboristoj kaj klarigis al ili la

celojn de la partizana movado kaj la programon de la Patrolanda Fronto.

Laŭ ordono de princo Kiril la stabo de la II armeo ellaboris detalan planon por ekstermo de la rodopaj partizanoj.

En la regiono de la taĉmento koncentriĝis 18 mil ĝendarmoj kaj policistoj. Oni ĉirkaŭsieĝis la vilaĝojn, kiuj helpis per provianto la taĉmenton. La militiro komenciĝis dum februaro 1944, kiam la montaro kuŝis sub dika neĝtavolo. La interbatalo daŭris pli ol dek tagojn. Fine la taĉmento estis venkita. Sur la batalkampoj kuŝis la kadavroj de 120 partizanoj, inter ili de ĉiuj esperantistoj.

Nur malmultaj savis sin. Ili daŭrigis la batalon. Aliĝis novaj antifaŝistoj. Dum la printempo en la arbardensejoj agadis brigadoj „Georgi Dimitrov“ kaj „Vasil Kolarov“, la taĉmentoj „Koljo Ŝiŝmanov“, „Asen Zlatarov“ kaj Ĉepinec“. „Kiam en septembro 1944



Partizana vintra tendaro „Teneran“ en Rodopi-montaro.



Georgi Ječev



Vela Peeva



Dimităr Petrov

la Ruĝa armeo transiris Danubon, la partizanoj ribeligis la popolon. La faŝista regpenco estis renversita.

La bulgara popolo ne forgesas la heroojn, pereintajn en la batalo por libero. Popolaj kantistoj verkis versojn pri ili. Jen strofoj pri la partizanino Katja Vančeva, kiu aliĝis al taĉmento „Anton Ivanov“, lasante sian bebon al la bopatrino:

Adiaŭ, mia fileto,
mi lasas vin sen varto,
mi lasas vin sen lakto. . .

Alia popolkantisto jene priskribas la sangajn orgiojn de la faŝistoj:

Vilaĝo kuŝis sub neĝo,
rivero brilis glacie,
kiam ĝendarmoj alvenis
kun kapoj partizanaĵ,
por vilaĝanojn timigi.



Ivan Filev

Lamentis la virinoj,
ululis hundoj en kortoj,
kaj bovoj blekis en staloj. . .

Profunda estas la kredo de la popola kantisto pri la proksima venko:

Baldaŭ venkos la Ruĝa armeo,
descendos de monto partizanoj,
disrompos pordojn de prizonoj
kaj libere ekspiros popolo.
Tiam vi, murdistoj, ekstaros
antaŭ la Popola tribunalo
kaj vin akuzos partizanaĵ kapoj,
disportataj de vi per pikbastonoj.
Akuzos vin larmoj de patrinoj
kun nigraj kaptukoj. . .



Kosta Atanasov

Kaj okazis tiel, kiel tekstis la popola kanto.

Ĥ. ISKROV

XII KONGRESO DE BKP KAJ LA TASKOJ DE BEA



Raportas Hristo Gorov — prezidanto de BEA.

La decidoj de la XII kongreso de BKP ludos gravan rolon en la plua konstruado de la matura socialisma socio en Bulgario. Ili starigas taskojn por la laboro de ĉiuj soci-politikaj kaj kulturaj organizaĵoj en nia lando. Pro tio je la 29a de junio 1981 en Sofio okazis plilarĝigita plenkunsido de CE de BEA, kies celo estis pritrakti la taskojn de BEA, devenantajn el la decidoj kaj la dokumentoj de la kongreso. Ĉefaj eroj de la tagordo estis la raportoj „La XII kongreso de BKP kaj la taskoj de la Bulgara Esperantista Asocio“ kaj „La batalo por paco — devo de ĉiu esperantisto“.

En la unua raporto, kiun faris la prezidanto de CE de BEA Hristo Gorov, estis substrekite, ke la kongreso estis pinto de la Lenina linio, akceptita de la Plenkunsido de CK de BKP en aprilo 1956. La raportinto skizis la bazajn direktojn de la soci-ekonomia politiko de la partio, kiujn la kongreso aprobis ĝis 1990 jaro kaj la ĉefajn taskojn de BEA en ĝia estonta agado. Kiel unuagradan devon de la Asocio k-do Gorov indikas la ankoraŭ pli aktivan mobilizon de la esperantistoj por la efektivigo de la partia politiko; laboron por plialtigo de la socialisma konscienco de ĉiu esperantisto. Plue la raporto analizis la agadon de la Asocio dum la periodo de post la jubilea 40a kongreso de BEA, okazinta en Plovdiv en julio 1980, montrante la atingojn, la mankojn kaj la vojojn por ties forigo.

La duan raporton faris Nikola Aleksiev — membro de la Buroo de CE de BEA kaj honora prezidanto de MEM. Li emfazis, ke la starigo de la demando pri la pacbatalo en la plilarĝigita plenkunsido de CE de BEA havis la grandan signifon aktivigi ankoraŭ pli efike nian laboron por utiligo de la Internacia Lingvo en la pacbatalo. La bulgaraj esperantistoj, kiel parto de sia popolo — diris k-do Aleksiev, — devas kontribui por plenumo de la decidoj de la kongreso de BKP en la vasta kaj decida por la sorto de l' homaro kampo de batalo por paco en la mondo.

K-do Aleksiev faris ankaŭ profundan analizon de la internacia situacio, montrante la atingojn de la popoloj en la batalo por paca evoluo de la mondo, la kialojn por la ŝanĝo en la politiko de Usono kaj ties nova milit-strategio. La raportinto alte aprezis la Alvokon de la Supera Soveto de USSR al la parlamentoj kaj la popoloj en la mondo.

La raportinto montris la konkretajn taskojn de la esperantistoj en la batalo por malmado, amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj. Li proponis, ke CE de BEA kaj Bulgara MEM-Komitato organizu kolektadon de subskriboj subteno al la Petskribo de la Kvakera Esperanto-Asocio pri kampanjo por monda malmado, publikigita en n-ro 4, 1981 de revuo „Esperanto“.

La du raportoj provokis viglan diskutadon. Ĉiuj parolintoj aprobis la raportojn. Estis akceptita rezolucio pri la estonta agado de BEA, surbaze de la raportoj kaj la eldiroj.

Laŭ la propono de la Buroo de CE de BEA estis unuanime kooptitaj kiel membroj de CE de BEA Canko Ignev, prezidanto de la E-societo „Maksim Gorki“ en Sofio, kaj Dončo Hitrov — la nova ĉefredaktoro de revuo „Bulgara Esperantisto“.

La partoprenintoj en la plenkunsido unuanime aprobis saluttelegramojn al CK de BKP kaj al la Supera Soveto de USSR subteno al la Alvoko „Al la parlamentoj kaj la popoloj en la mondo“.

La plenkunsido akceptis vicon da instrukcioj lige kun la estonta organiza laboro.

Pro bona agado per libroj estis premiitaj:

— Veska Dragostinova kaj Dimităr Minčev, prezidantino kaj sekretario de la Organiza Komitato de la Scienc-praktika Konferenco „Bulgario 1300“ en Ŝumen; Stojan Pavunčev, Bojčo Mladenov kaj Kiril Velčev pro la organizado de Botev-Recitalo en Vraca.

Post la malfermo de la plenkunsido ties partoprenintoj vizitis la Centran Tcmbejon,

kie ili metis florkronon je la nomo de UEA ĉe la tombo de Atanas D. Atanasov — ADA, eminenta E-veterano, forpasinta en marto 1981. Paroladon pri la grandaj meritoj de ADA al la tutmonda E-movado faris la vicprezidanto de BEA kaj membro de la Estraro de UEA Petăr Todorov.

Vespere en la salono de kulturaj agantoj okazis solena koncerto omaĝe al la 1300-jara jubileo de la Bulgara ŝtato kun la partopreno de elstaraj plenumantoj-esperantistoj.

DIMITAR HAĜIEV

ALVOKO

de la Centra Estraro de Bulgara Esperantista Asocio kaj de la Bulgara Komitato de Mondpaca Esperantista Movado (MEM)

Ni alvokas ĉiujn organizitajn kaj neorganizitajn esperantistojn, same kiel la amikojn de la Internacia Lingvo Esperanto en nia lando meti sian subskribon sub tiun ĉi Alvokon, direktitan de la Kvakera Esperantista Societo kaj publikigitan en n-ro 4, 1981 de revuo „Esperanto“, organo de UEA, Roterdamo.

La Alvoko estas subtene al la decidoj de la Unua Speciala Sesio de la Generala Asembleo de la Unuigintaj Nacioj pri Malarmado, okazinta en 1978 en Novjorko, Usono. La subskriboj, kolektotaj sub ĝi, estos senditaj al la Generala Asembleo de UN kaj transdonitaj al la partoprenantoj en la Dua Speciala Sesio de la Generala Asembleo de UN pri Malarmado, 1982. Jen estas parto de la teksto de la Alvoko:

„Al ĉiuj registaroj kaj al la Ĝenerala Asembleo de Unuigintaj Nacioj, Speciala Sesio pri malarmado, 1982:

Ni la popoloj de la mondo postulas:

1. La abolicon de nukleaj armiloj kaj ĉiuj armiloj por amasdetruo
2. La abolicon, laŭ konsentitaj stadioj, de konvenciaj armiloj, kio kondukis al:
3. Ĝenerala kaj kompleta malarmado
4. Transigo de pormilita Elspezado al la tutmonda forigo de Malriĉeco.“

DEFENDU LA PACON KAJ VIVU !

Noto: La listojn kun la kolektitaj subskriboj bonvolu sendi al jena adreso: Bulgara Esperantista Asocio — Bulgara MEM-Komitato, bul. „Hristo Botev, 97, 1303 Sofio.

* * *

Reeĥe al la supra alvoko en la Bulgara MEM-Komitato estas ricevita petskribfolioj kun entute 3417 subskriboj, kolektitaj de 18 E-societoj kaj de unu pacaktivulo. Ni mencias la E-societojn kaj individuojn, kiuj kolektis pli ol 200 subskribojn:

- | | |
|---|--------|
| 1. E-societo „L. L. Zamenhof“, urbo Dve Mogili, distrikto de Ruse | — 1760 |
| 2. E-societo „Paco“, u. Jakoruda, distrikto de Blagoevgrad | 322 |
| 3. E-societo „Aŭroro“, u. Septemvri, distrikto de Pazarĝik | 284 |
| 4. Aleksandăr Hristov Araĉijski, v. Gerovo, distr. de Pazarĝik | 205 |

Sekvu la ekzemplon de la esperantistoj en urbo Dve Mogili kaj de k-do Araĉijski!

La decido de la usona registaro komenci la produktadon de la neŭtrona bombo, kiu estas plia grandega minaco por la paco kaj la sorto de la homaro, devigas nin batali kun pli da energio por la abolicio de la nukleaj armiloj kaj la malarmado.

BULGARA MEM-KOMITATO



La prezidantaro de la plenkunsido de BEA

AMASA KAJ ALTNIVELA UMEA-KONFERENCO EN RUSE



Petăr Todorov — vicprezidanto de BEA, salutas la IMEK-konferencanojn.

„En la nomo de ĉiuj gekolegoj, membroj de Universala Medicina E-Asocio (UMEA), mi dankas pro la dispenigita favora ebleco organizi en Bulgario la III Internacian Medicinan E-Konferencon (IMEK). Kampare kun la okazintaj du konferencoj — en Krakovo (Pollando) kaj Hdmezövásárhely (Hungario) — tuj impresas, ke la nombro de partoprenantoj en ĉiu sekva forumo plimultiĝas. Kaj tiu fakto konvinke atestas pri la kreskinta intereso de la kolegoj-medicinistoj pri la komunikad-eblecoj, kiujn dispenigas la lingvo Esperanto por popularigi la plej novajn kaj gravajn atingojn en la tutmonda medicino kaj interŝanĝi pozitivajn spertojn. . .“

Per tiuj vortoj Imre Ferenczy, sekretario de UMEA, karakterizis la kreskantan popularecon de Esperanto inter la medicinistoj kaj la tendencon al ĉiam pli amasa partopreno en la UMEA-konferencoj.

Gastiganto de la III IMEK estis la plej granda bulgara havenurbo ĉe Danubo — Ruse. Ties ĉarmo kaj allogeco venas de la malnovaj barokaj konstruaĵoj — verkoj de diverslandaj arkitektoj, kiuj atestas pri tiom multe da libereco kaj krea inspiro. La urbo havas malnovajn kulturajn tradiciojn: 100-jara teatro, aŭtoritata operejo, simfonia orkestro, kaj depost 21 jaroj okazas ĉi-tie la internacia

muzikfestivalo „Martaj Muziktagoj“, en kiu partoprenas elstaraj solistoj kaj orkestroj. Ruse estas ankaŭ industria kaj administra centro de distrikto, konata ankaŭ pro sia malnova malsanulejo kaj tradiciicia sanprotektado. Tial la urbo ne hazarde estis preferita kiel konferencloko de medicinistoj.

La arangon organizis CE de BEA kunlabore kun la medicinista sekcio de BEA kaj la DE de BEA — Ruse, helpataj ankaŭ de Ministerio pri Sanprotektado, Sindikato de Sanlaboristoj, Distrikta Komitato de BKP, Komunuma Popola Konsilantaro kaj Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto en Ruse. Partoprenis 220 medicinistoj el 10 landoj. Ĉeftemoj de la III IMEK estis „Zorgoj pri protektado de la ĉirkaŭ-medio“ kaj „Apliko de Esperanto en la medicino“. Oni aŭskultis 43 fakprelegojn pri la stato, tendencoj kaj taskoj de la nuntempa medicino, pri problemoj de profilaktiko, klinikaj esploroj kaj apliko de novaj kuracaj kaj diagnostikaj metodoj. Estis pritraktitaj ankaŭ momentoj el la bulgara medicina historio.

La konferencanoj vizitis resanigejojn kaj ekkonis la vidindaĵojn de Ruse. Lige kun la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato okazis du tuttagaj aŭtobusaj ekskursoj al memorindaj historiaj lokoj — Veliko Tŕrnovo kaj Sumen (Ĉevalrajdanto de Madara, Pliska).

En la lasta tago okazis organiza kunsido de la medicinista sekcio de BEA kaj konkluda plenkunsido kun prelegoj je temo „Apliko de Esperanto en la medicino“. La konferencanoj unuanime akceptis „rekomendojn“ al Monda Organizaĵo pri Sano, Internacia Ruĝa Kruco, ministerioj pri sanprotektado kaj medicinaj institutoj;

„La III Internacia Medicina E-Konferenco

REKOMENDAS:

- eldoni informilojn de la Monda Organizaĵo pri Sano en la Internacia Lingvo Esperanto;
- efektivi kunlaboron inter la Universala Medicina E-Asocio kaj la Internacia Ruĝa Kruco;
- enkonduki la Internacian Lingvon Esperanto kiel oficialan lingvon ĉe la diversfa-

kaj internaciaj medicinaj kongresoj kaj konferencoj;

— instrui Esperanton por medicinistoj kaj medicinaj studentoj;

— eldoni scienccinajn librojn, monografiojn, sciencajn revuojn, kaj ankaŭ resumojn en respektivaj revuoj kaj libroj.

Oni aprobis ankaŭ tekston de pactelegramoj al Monda Organizaĵo pri Sano kaj Mondpaca Esperantista Movado.

La okazigo de la medicina konferenco realigis strikte laŭ la fiksita tagordo kaj regularo de UMEA. En la apartaj kunsidoj, en la paŭzoj kaj la privataj interparoloj la partoprenantoj emfazis la altan organizan kaj scienca nivelon de la III Internacia Medicina E-Konferenco. Oni esprimis deziron, ke la sekva konferenco transformigu en medicinan E-kongreson, kio konformus al la kreskintaj bezonoj de pli reprezenta forumo.



Fremdlandaj delegitoj de la III IMEK gastas al la Urba Konsilantaro

REEĤOJ PRI LA III IMEK

PROF. D-RO KIRIL POPOV, PREZIDANTO DE LA MEDICINA SEKCIO DE BEA:

— Mi volus trakti la sciencajn laborprogramojn de la konferenco. Multaj prelegoj emfazis la rolon de la socia medio por la psika malsanigo, por la suĉinfana kresko kaj la kaŭzojn de frua infana morto. Oni tuŝis ankaŭ la malsanigan efikon de la tabakfumado kaj la eblecojn de ties antaŭforigo. La bulgaraj prelegintoj kontribuis al interpreto de la bazaj principoj de evoluo de la profilaktika medicino ĉe ni.

Diversgrade ligitaj kun la baza temo estis

prelegoj, traktantaj interesajn klinikajn observojn, kaj nome pri bova trihofitozo kaj la homa malsanado je ĝi, haŭtefiko ĉe la malsano de Klajnfelder, funkciaj anomalioj de la ezofago, meningito ĉe akuta leŭkemio de infanoj. Al tiu ĉi parto apartenas ankaŭ la prelegoj pri novaj kuracaj kaj diagnostikaj metodoj, pri la esploro de sedimento el la cerebrospina fluidaĵo helpe de la kamero de Sajk, pri la diagnostika glikozo-testo por la malsanuloj je cerba sangelfluo, la projekcio de filmo pri bulgara hista gluaĵo „Kano-konlit — B“ kaj ties apliko en la kirurgio k. a.

La prelegojn oni pretigis kun granda zorgo kaj prezentis konvinke per ĉiuj necesaj vidaj rimedoj. Pro tio la konferenco plene kontentigis la postulojn de vera internacia medicina arango.

D-RO SAVAS TSITURIDES, ATENO, GREKLANDO:

— Per la unua fojo mi partoprenas en medicina E-konferenco. Impresis al mi la relative alta nombro da partoprenantoj, kies plimulto akurate sekvis la laborkonferencon. Mi havis eblecon konatiĝi kun multaj kolegoj-esperantistoj el diversaj landoj, pridiskuti problemojn kaj demandojn de mia fako kaj interŝanĝi profesiajn spertojn.

Gratulojn al la organizantoj de la III IMEK. Dank'al ili ni senprobleme laboris kaj ĝuis agrablan restadon en Ruse.

D-RO KLAUS BOCHMANN, BRÄUNSDORF, GDR:

— La III IMEK estis inda daŭriganto de la sukcesplena II IMEK en Hodmezövásárhely (Hungario) antaŭ du jaroj. La scienca kaj la lingva nivelo de la multnombraj prelegoj estis alta. Ni denove pruvis, ke E-o plensukcese povas servi al la internaciaj medicinaj kontaktoj.

La restado en la bela urbo Ruse estis tre agrabla dank'al la diligentaj kaj gastamaj organizantoj kaj ĉiuj bulgaraj gekolegoj. La ekskursoj al Ŝumen kaj Veliko Târnovo estis interesaj kaj konatigaj kun bulgaraj historiaj vidindaĵoj.

D-RO WŁODZIMIERZ OPOKA, KRAKOWO, POLLANDO:

— Kun plezuro mi konstatas, ke tiu ĉi medicina konferenco estas la plej multnombra ĝis nun. La riĉa scienca programo kaj la variaj ekskursoj kontribuis, ke la III IMEK restu kiel neforgesebla travivaĵo en la memoro de mi kaj miaj krakovaj gekolegoj. Reveninte Pollandon, mi bone memoros vian landon kaj la gastamcon.

Dank'al la bulgaraj kolegoj nia internacia medicina movado faris novan paŝon al plua evoluigo de la Internacia Lingvo kaj denove pruvis, ke IMEK-oj havas ne nur popular-scian, sed ankaŭ vere scian karakteron.

Ruse—Sofio,
Junio, 1981

EVGENI GEORGIEV



Partoprenintoj en la III IMEK — Ruse

Ĉe la plej suda latitudo de la impona Danubo situas la kvietaj kaj enreviginta urbo Sviŝtov. Konata ekde jarcentoj, en sia nova historio la urbo memorigas al ni pri la unuaj paŝoj de la rusaj soldatoj, liberigintaj Bulgarijon el sub osmana jugo, pri la verkisto Aleko Konstantinov (la Feliĉulo), pri la unikaj arkitekturaj monumentoj de la konstrumajstro Kolju Fiĉeto. Tamen ĝia moderna historio estas ligita precipe kun la kemiproduktado de kombinumum „Sviloza“ kaj la altgrada instruado en Supera Ekonomia Instituto „D. A. Ĉenov“. En ĝiaj aŭditorioj kaj haloj okazis SVIEKO' 81 — ekologia konferenco kun celo tuŝi teori-praktikajn problemojn kaj ĝeneraligi la akiritajn spertojn en la sfero de medioprotektado.

La ekonomi-teknikaj problemoj sekve de la venenaj influoj sur la ĉirkaŭmedion estis la scienca bazo de la prezentitaj 123 raportoj de pli ol 200 sciencistoj, inter kiuj membro koresp. prof. Ljuben Tonev (Bulgario), prof. Gjunter Ŝtraj (GDR), prof. Ĥristo Marinov (Bulgario), doc. Arpád Máthe (Hungario), mag. sc. Ljudmila Kozlovskaja (Sovetunio), mag. sc. Georgi Golov (Bulgario).

Por la unua fojo estis rekonita Esperanto je alta profesia nivelo kiel egalrajta laborlingvo krom la bulgara kaj la rusa lingvoj. En la E-sekcio partoprenis dudeko da ekoloĝoj el Hungario, Nederlando kaj Bulgario, kiuj faris 10 sciencajn raportojn.

La raporto de doc. Máthe en la malferma plenkunsido forte impresis al la neesperantistaj partoprenantoj. Li pritraktis aktualajn demandojn pri la malpliigo de venenaj defalaĵoj. Oni esprimis surprizon kaj kontentecon de la belsoneco kaj esprimovo de E-o. F-ino Marta Kadar (Hungario) prelegis pri „Malpurigado de la naturmedio kaj problemoj de la vivmedio“. Ing. Petár Todorov raportis pri bulgaraj kaj eksterlandaj esploroj pri cindro-uzado ĉe la produktado de cemento, konstrumiksaĵoj kaj betono. Oni devas aparte danki al prof. Ĥristo Marinov — prezidanto de la ekologia sekcio de BEA pro la fervoraj

preparlaboroj kaj la prizorgado dum la konferenco.

La labor-kaj loĝkondiĉoj, la ekskursoj al Veliko Tárnov kaj Gabrovo, la vizito al la kemia kombinumum „Sviloza“, la koktelo de la rektoro de Supera Ekonomia Instituto — ĉio ĉi pasis je modela nivelo, disponigante bonajn eblecojn por kontaktoj inter la partoprenantoj. Oni decidis okazigi la sekvan SVIEKO en 1984. La temo estas „La rolo de la ekologia faktoro en la teritoria kaj arkitektur-planada organizado de la vivmedio kaj la sistemo de produktadfortoj“.

En unu el la paŭzoj doc. Arpád Máthe estis afabla dividi siajn impresojn pri la arango:

— SVIEKO' 81 faris ĝojigan impreson, ke la teorio estas ligita kun praktikaj aspektoj. La ekologiigo en la socialismaj landoj estas planata: la ŝtato mem starigas la demandojn kaj apogas la solvojn. Ili eniras en la kvin-jarajn planojn por soci-ekonomia evoluo. Mi deziras menci, ke la ekonomia mekanismo en Hungario (kaj kiel mi komprenas ankaŭ en Bulgario) ebligas al 20 000 sciencistoj el la universitatoj kaj la aliaj altlernejoj partopreni en la solvado de maturigintaj produktad-problemoj — ne nur en laboratorio, sed ankaŭ per industriaj eksperimentoj kaj per konkreta aplikado.

Miaopinie la Internacia Lingvo Esperanto, per kiu ni facile interkomunikadas, povas kaj devas esti helpilo por la ekoloĝoj el diversaj landoj. Ĉi-tie, ekzemple, mi eksciis, ke unu el la scienc-praktikaj temoj, pri kiu ni okupiĝas en la Budapeŝta Universitato, estas ankaŭ temo de sciencistoj el la Naftkemia Kombinumum en Burgas. Kial do ni ne kunlaboru surbaze de komuna lingvo por solvo de komunaj problemoj?

La E-movado atingis grandan sukceson, stariginte E-sekcion de la tradiciaj sciencaj konferencoj SVIEKO en Sviŝtov. Ni klopodu altiri pli multajn ekoloĝojn-esperantistojn al SVIEKO' 84 kaj per kunlaboro firmigu la ekologian E-movadon!

ING. PETÁR TODOROV

LA BUROO DE LA DISTRIKTA ESTRARO — DIREKTANTA KAJ GVIDA ORGANO

Aparte gravan signifon por disvolvigo de la E-movado havas la burooj de distriktaj estraroj de BEA — kolektivaj organoj, kiuj gvidas la agadon de distriktaj E-organizaĵoj dum la periodo inter la plenkunsidoj.

Estas dezirinde elekti membrojn de la buroo de DE (5 ĝis 11 personoj) inter la plej bonaj esperantistoj. Oni okazigas la elekton en la unua plenkunsido post la raporta-elekta konferenco. La elektitaj prezidanto, vicprezidanto kaj sekretario de DE estas ĝiaj plej respondecaj reprezentantoj. En la buroo devas esti elektitaj ankaŭ e-istoj sindonaj kaj kompetentaj el la E-societoj. Tiamaniere la buroo farigos organo vere gvidkapabla kaj kompetenta por la tuta teritorio de la distrikto.

La respondeculo pri la organizaj demandoj estas la persono, kiu planas la kunsidojn de la buroo por 3, 6 aŭ 12 monatoj, dissendas invitojn pri la estontaj kunsidoj kun la tagordo, anticipe prikonsentita kun la prezidanto.

Por plenumi bone sian rolon de kolektiva gvidorgano, la buroo tamen devas kolektigi laŭeble pli ofte. En la kunsidoj oni kutime traktas demandojn pri la disvolvigo de la E-movado en la distrikto, la organizan kaj finanĉan staton de la societoj, fakan E-agadon; la laboron de diversaj komisionoj, la kursan laboron, la kunlaboradon kun aliaj organizaĵoj (Patrolanda Fronto, sindikatoj, Komsomolo, kulturdomoj, turistaj societoj, pacdefendaj komitatoj ktp). Oni analizas la kaŭzojn de la mankoj kaj eraroj, montras rimedojn por ties forigo. Estas necese, ke la traktado de la starigitaj problemoj finiĝu per koncernaĵa decido, devigaj por ĉiuj malsuperaj organoj kaj organizaĵoj.

Kutime la membroj de la buroo respondecas pri unu aŭ kelkaj E-societoj, al kiuj ili donas konkretan helpon kaj kies vivon ili observas. Tradicie la buroo difinas respondeculojn pri la demandoj de la E-propagando, instruado, organiza laboro, faka agado, junulara agado, informado, pacbatalo, internacia agado, biblioteko, arkivo, kooperativa agado k. a.

La prezidanto ordinare estas la homo, kiu respondecas pri la tuta laboro de la distrikta organizaĵo. Li direktas kaj kunordigas la agadon de ĉiuj membroj de la buroo, observas la plenumadon de la prenitaj decidoj. La prezidanto reprezentas DE antaŭ la lokaj gvidorganoj kaj institucioj, antaŭ la tuta socio.

La vicprezidanto ordinare respondecas pri iu sektoro de la agado — propagando, instrulaboro, internacia agado ktp. Se necesas, oni povas elekti du aŭ tri vicprezidantojn.

La sekretario zorgas pri organizaj demandoj, ĝustatempa kolektado de la membrotitoloj, planado en ĉiuj ĉeneroj de la organiza vivo de la societoj. Lia zorgo estas ankaŭ la plenkunsidoj de DK. Ĉar la organiza laboro estas ege ampleksa kaj peza, estas bone altiri helpanton de la sekretario, kiu zorgu ankaŭ pri la arkivo de DE.

La respondeculoj de sektoroj agadas konekse kun la instrukcioj de la Centra Estraro. Gravajn demandojn ili solvas nur post konsultigo kun la prezidanto, vicprezidanto aŭ sekretario de DE.

La laboro de la buroo de DE estas grava elemento en la tuta procedo de gvidado de la E-laboro en la distriktoj. Ties bona organizo kaj regula funkciado garantias pluan sukcesan disvolvigon de la E-movado en nia lando.

ABONU AL «BULGARA ESPERANTISTO»!

La abonkampanjo pri revuoj kaj gazetoj en nia lando por 1982 jam komenciĝis. Ĝi daŭros ĝis la 10-a de decembro j. k.

La redakcio de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ alvokas ĉiujn societajn, distriktajn kaj sekciajn estrarojn de Bulgara Esperantista Asocio kaj ĉiujn aktivulojn de BEA senprokraste komenci abonlaboron inter sia anaro al nia ŝatata revuo „Bulgara Esperantisto“.

Aboni al „BE“ estas honoro kaj devo de ĉiu bulgara esperantisto, ĉar tio ja estas ankaŭ esprimo de subteno de nia E-movado, de solidareco kaj sindonemo al la disvastigo de Esperanto en nia lando.

Ci-jare ni atingis bonan sukceson: pro la granda intereso al nia revuo kaj dank' al la sindona abonagado de niaj perantoj el pli ol 15 fremdaj landoj, la tuta eldonkvanto de „BE“ por 1981 estis elĉerpita. Bedaŭrinde, multaj dezirantoj aboni al „BE“ ne sukcesis ricevi ĝin kaj restis sen la ĉi-jara kolekto.

Por la sekvonta 1982 la redakcio obstine faros ĉiujn necesajn paŝojn ĉe la Komitato pri Gazetaro por plialtigi de la eldonkvanto de „BE“ je almenaŭ 7000 ekzempleroj kaj por plibonigi de la kvalito de la papero kaj la presado. Krome, la redakta komi-

tato strebos pliriĉigi la enhavon de la revuo per interesaj materialoj de bulgaraj kaj fremdlandaj aŭtoroj.

La redakcio de nia asocia organo atentigas ĉiujn bulgarajn kaj fremdlandajn esperantistojn, dezirantajn aboni al „Bulgara Esperantisto“, nepre fari tion kiel eble plej baldaŭ, ne atendante la lastan limtempo, ĉar la eldonkvanto povas okazi nesufiĉa por ĉiuj dezirantoj. La bulgaraj e-istoj abonu nepre pere de REP (Stata entrepreno por disvastigo kaj ekspedado de gazetoj) kaj la fremdlandanoj — ĉe la peranto de „BE“ en la koncerna lando aŭ rekte al la adreso de la redakcio — BG 1303 — Sofio, Bul. Ĥristo Botev 97, (P. K. 66), Bulgario.

La abonprezo de „BE“ por 1982 restas neŝanĝita: por Bulgario — 2,90 levo, por la socialismaj landoj — 5,42 levoj kaj por la nesocialismaj landoj — 5,90 levoj (aŭ egalvaloro en nacia valuto — ĉirkaŭ 5 usonaj dolaroj).

Karaj bulgaraj kaj fremdlandaj amikoj de revuo „Bulgara esperantisto“, ne prokrastu vian abonon! Estu ardaĵa propagandanto de via ŝatata revuo — necesa kaj utila legaĵo por ĉiu esperantisto.

Ni atendas vian kontribuon!

LA REDAKCIO DE «BE»

Dediĉe al la 1300-jara datreveno de Bulgario la 20-21 de junio en Varna okazis la III Mara Amika Renkontiĝo Esperantista (MARE). Ĝin partoprenis multaj geesperantistoj el diversaj distriktoj de la lando kaj el eksterlando (Ĉeĥoslovakio, Pollando).

En la nomo de la Buroo de Centra Estraro de BEA salutparolis Violin Oljanov, ĉefredaktoro de revuo „Paco“. Li emociie emfazis la utilon kaj la neceson de similaj E-renkontiĝoj, kiuj kontribuas al unuiĝo kaj amikiĝo de la e-istoj. Tio certe firmigas niajn vicajn por plenumo de niaj respondecaj taskoj, starigitaj je la 40a kongreso de BEA kaj la XII kongreso de BKP.

La partoprenantojn bonvenigis Dobrinka Trăpkova, prezidantino de la loka E-societo „Albatroso“, kies membroj estis organizantoj de la aranĝo. En la nomo de DE de BEA salutis doc. Georgi Dimov.

La solena kunveno aprobis la tekstojn de du pactelegramoj al la Internacia Komitato de MEM kaj al Centra Estraro de BEA.

Sekvis riĉa belarta programo kaj agrabla interkona vespero. En la dua tago okazis ekskurso al la mondkonata ripozejo „Oraj Sabloj“. En bonhumoro kaj gaja etoso oni guis la belecon de la nigramara bordo.

SAŠA NEDEVA

AMATORA TEATRA E-TRUPO



En la mezlernejo „Vasil Drumev“ funkcias E-kurso, kiun partoprenas 20 ĝelernantoj. Fine de la pasinta jaro oni decidis organizi teatran E-trupon.

Nia talenta „reĝisorino“ Mariana Dobрева, lernantino en IX klaso, elektis tekston el la 13a ĉapitro de „La aventuroj de Nescianto“ de N. Nosov. Esperantigis ĝin nia E-instruistino Olga Cankova. Post longa kaj ambicia preparado Antoaneta Kirilova, Emilija Semova, Snežina Mihova, Hristina Boeva, Galja Koleva kaj Mariana Dobрева sukcesis realigi la teatraĵon.

La E-trupo havis ĉi-jare prezentadojn antaŭ e-istoj en VARE (Kubrat) kaj PARE (Ruse). Dum la lerneja festo instruistoj kaj lernantoj varmege aplaudis la teatraĵon.

ANJELA STEFANOVA

LA UNUJ PIONIROJ

La E-societo en urbo Dupnica (nun Stanke Dimitrov) estis fondita en 1909. Tamen kelkajn jarojn antaŭe Todor Mijorov, Aleksandar Sakelarijev, Hristo Stamboliev k. a. diligente lernis la Internacian Lingvon. Jam en 1906 la horlogisto Todor Mijorov korespondis kun e-istoj el Germanio, Hungario kaj aliaj landoj en Eŭropo.

Rigardante la korespondadojn de Todor Mijorov, impresas la idealismo kaj la abnegacio de la unuaj propagandantoj de la ideo pri interpopola amikeco kaj interkompreniĝo per la Internacia Lingvo Esperanto.

STOIL KOLAROV

RENKONTIĜO EN SAMOKOV

La tradicia dutaga somera renkontiĝo de e-istoj el Sudokcidenta Bulgario arigis en Samokov imponan nombron da partoprenantoj. Inicijita komence kiel interkona renkontiĝo de e-istoj, ĝi iom post iom transformiĝis en forumon por propagando de la ideo pri la Internacia Lingvo kaj pri la idealoj de la e-istoj. Ĉi-jare la renkontiĝon aŭspiciis la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto kaj modele ĝin organizis la loka E-societo „Rila Esperantisto“. La aranĝo elstaris kiel kultura evento de la tuta urbo.

La solenan kunvenon gvidis la prezidanto de la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto Ĉekurov. Centra ero estis la prelego de Ljubomir Mihajlov, prezidanto de DE de BEA. Li prezentis la evoluon de la ideo pri Internacia Lingvo kaj la konsciigo pri ties neceso en la nuntempa mondo. La preleginto speciale emfazis la kontribuon tiurilate de la bulgaraj e-istoj, ero de la bulgara socialisma kulturo, kiun ni nun celebras lige kun la 1300-jariĝo de Bulgario.

Agrabla ĝuo por la ĉeestantoj estis la koncerto, en kiu lokaj amatoraj ensembloj surprizis la publikon per sia majstrecio.

La komuna vespero en la sino de la bela Rila-montaro kaj la ekskurso al la ĉirkaŭaĵo de montopinto Maljovica en la sekva tago sendube postlasos neforgeseblajn rememorojn ĉe ĉiuj, kiuj partoprenis la ĉi-jaran renkontiĝon.

L. M.

En Pleven okazis vigla junulara E-kurso por komencantoj. Ĝin partoprenis 15 personoj kun diversaj profesioj — oficistoj, laboristoj, medicinistoj — ĉiuj junaj, entuziasmaj kaj lernemaj. Ĉiumerkrede ili kolektiĝis en la klubejo de la loka E-societo. Ilia diligenteco kaj fervoro instigis min stari ĝi la demandon: „Kial vi lernas E-on?“ Jen iliaj respondoj:



V. Dimitrova (ingeniero): „Mi ŝatas lerni fremdajn lingvojn. Mi deziras koni miajn samaĝulojn el diversaj landoj, scii pli multe pri ties vivo, kulturo, moroj.“

L. Sačanski (oficisto): „Mi deziras scii ĉiam pli kaj pli pri la mondo.“

M. Ĥinova (studentino): „Mi ŝatas korespondi. Per E-o mi havas multajn geamikojn en diversaj landoj.“

L. Ĥubčev (laboristo): „Mi deziras partopreni junularajn laborbrigadojn, renkontiĝojn, vojaĝadojn.“

I. Simeonova (legistino): „Le lingvo estas agrable kaj interesa. E-o faciligas la kontaktojn inter la geuloj el diversaj partoj de la mondo.“

D-rino E. KANJOVSKA

GABROVO: E-grupo el lernejo „T. Karpinskaja“ vizitis la domon de la malnova esperantistino Elena Kovačeva. Ni aŭskultis tre interesajn rememorojn pri ŝia esperantigo, pri ŝia 26-jara korespondado en la Internacia Lingvo. Kun admiro la gelernantoj trarigardis ŝian belegan kaj riĉan pupkolekton. Ni vidis interesajn diverslandajn popolkostumojn kaj tre belajn bildkartojn el Francio, Britio, Hispanio, Japanio k. a.

Per ni estis granda plezuro aŭskulti surbendigitajn sciojn de la aŭstraliaj birdoj Kokabara kaj Lira.

SONJA TIHOVA

La Sekcio de la muzikistoj kaj artistoj kaj la Urba Estraro de BEA — Sofio, organizis je 29a de junio en la salono de la kulturaj agantoj solenan koncerton, dediĉitan al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato.

En la riĉenhava arta kaj muzika programo partoprenis niaj bone konataj artistoj-esperantistoj M. Angelova, K. Adamova, B. Beleva, M. Ĉobanov, V. Damjanov, B. Ikonomova, E. Kamburova, G. Kostova, S. Kalimenova, M. Karamihajlov, R. Malamova, V. Petrova, A. Sotirova, V. Vajarova, M. Zdravev kaj aliaj. La gekantistojn akompanis F. Filipova kaj V. Vasilev.

La koncerton ĉeestis ne nur esperantistoj el Sofio, sed ankaŭ el diversaj lokoj de la lando, partoprenintaj la nacian konferencon de BEA, okazintan en la sama tago. En la salono estis ankaŭ neesperantista publiko, kiu manifestaciis grandan intereson al la koncerta programo. Antaŭ la koncerto la Ĝenerala Sekretario de BEA k-do Kunčo Vălev direktis varmajn salutvortojn al la koncertantoj kaj la gastoj.

Dum pli ol du horoj muzikistoj kaj artistoj plenumis en Esperanto je alta artnivelo verkojn de bulgaraj kaj fremdlandaj aŭtoroj. La plimulto de la plenumitaj verkoj estis speciale preparita por la koncerto. Koraj aplaŭdoj estis direktitaj ne nur al la aŭtoroj kaj artistoj, sed ankaŭ al la tradukistoj-esperantistoj S. Simeonov, A. Grigorov, K. Vălev. La koncerton ĉeestis la popola artisto — heroo de la socialisma laboro — la komponisto D. Petkov, prezidanto de la Konsilio pri kultura agado. Li verkis speciale por la koncerto la kanton „Elmigrinto“ laŭ la teksto de la poeto-esperantisto Ĥristo Gorov, kiu estis plenumita unuafoje de Maria Angelova.

Post la koncerto multaj ĉeestantoj atendis la plenumantojn por saluti ilin kaj persone esprimi al ili siajn admirojn.

Tiu koncerto estis garava evento en la kultura vivo de la sofiaj esperantistoj.

A. M



Kanta K. Adamova

AMIKA RENKONTIGO KUN SOVETIAJ BRIGADANOJ

Agrable kaj emcia estis la renkontigo de membroj de la Buroo de CE de BEA kun sovetiaj brigadanoj el la Internacia Arkeologia E-Laborbrigado en v. Debnevo (distrikto de Loveč), kiu okazis de la 12a de junio ĝis la 6a de aŭgusto ĉ. j.

La junaj sovetiaj geingeneroj Oleg Krasnikov, Vladimir Zubov, Sergej Mirtjanov, Aleksandr Ivanov kaj Alevtina Gerasimova — ĉiuj el urbo Kirov — rakontis pri la interesa laboro en la brigado, pri la bone aranĝita kulturkaj amuzprogramo, pri siaj rilatoj kun la bulgaraj kaj alilandaj brigadanoj. Ili esprimis sian entuziasmon de la kortuŝe varma akcepto kaj de la belajoj de Bulgario, kiun ili unufoje vizitas.

La brigadanoj ekskursis al la malnovaj bulgaraj urboj Trojan, Loveč, Veliko Tŕnovo, Plevn k. a., kie ili vizitis multajn vidindaĵojn, ligitajn kun la antikva kaj nuntempa historio de Bulgario, kun la memoro pri la gloraj rusaj kaj sovetiaj soldatoj, pereintaj en la bataloj por nia liberigo. Ĉio ĉi provokis grandegan intereson ĉe ili, riĉigis iliajn konojn pri Bulgario.

La gastoj rakontis pri la instruado kaj disvastigo de E-o en urbo Kirov. El kelkmembra grupeto antaŭ du jaroj, la E-societo en Kirov rapide evoluis kaj nun jam havas pli ol 60 membrojn.

K-do Hristo Gorov konatigis la gastojn kun la bulgara E-movado. „Ĝi — li substrekis — havas malnovajn, jam 75-jarajn tradiciojn, intime ligitajn kun la revoluciaj luktoj de la bulgara laborista klaso kaj ties avangardo — la Bulgara Komunista Partio.“

La sovetianoj ricevis de BEA valorajn donacojn: E-lernolibrojn, vortarojn, kaj belartajn verkojn

D. S. Ĥ.

SLIVEN. Nia urbo kaj Peĉ (Hungario) estas ĝemelaj urboj. Jam kelkajn jarojn inter la distriktaj estrarejoj de BEA kaj HEA ekzistas viglaj rilatoj. En la tradicia SIA (Semajno de Internacia Amikeco) en Peĉ en februaro regule partoprenas reprezentantoj de nia distrikto.

Ni interŝanĝas informajn materialojn, E-librojn, spertojn. La amikaj ligoj profundiĝas.

Ĉ. KANTARĜIEV

ILEI—KONFERENCO EN GÖDÖLÖ INSTRUISTOJ-ESPERANTISTOJ KONFERENCIS EN HUNGARIO

La jara konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazis la 11—21 de julio ĉ. j. en urbo Gödölö (Hungario).

Ĉe la inaŭguro salutparolis Erzsebet Fónagy — reprezentantino de la Ministerio de Edukado, Flora Szabo—Felső — ĝenerala sekretario de UEA, Imre Pethes — prezidanto de MEM k. a. Parolis ankaŭ reprezentantoj de 6 landaj sekcioj de ILEI.

Raporton pri la agado dum la pasinta jaro faris la prezidanto de ILEI Helmut Sonnabend. Li emfazis la sukcesan instruadon en la hungaraj lernejoj, nomante ĝin „hungara modelo“, sekvinda ankaŭ en aliaj landoj.

La laborprogramo estis ampleksa kaj atentokapta. La konferencanoj havis eblecon aŭskulti interesajn kaj altnivelajn prelegojn. La plimulto el la prelegintoj estis hungaraj instruistoj kaj pedagogoj, inter kiuj Istvan Szerdahely — universitata profesoro. Oni prelegis pri movadhistorio, E-gramatiko, metodologio, interlingvistiko, pri la rezultoj de la tria esplorado de la pedagoga-didaktika eksperimento, pri instruado al elementklasejoj, pri la prezento de novtipa aŭd-vida instrumentaĵo k. a.

La ekskursoj estis variaj. La partoprenantoj vizitis Budapeŝton kaj trarigardis iujn el ties multnombraj vidindaĵoj. Okazis ankaŭ ŝipekskurso laŭ Danubo al la pitoreska urbo Szentendre. Tie oni trarigardis la subĉielan etnografian muzeon. Poste ni ŝipveturis plu al urbo Visegrad, kie ni vizitis ties ruinojn.

Menciindas ankaŭ la vizito al la tombo de la mondkonata E-poeto Kalman Kalocsay, troviganta en tombejo 10 km for de Gödölö.

Por la normala kaj fruktodona laboro de la konferenco la hungaraj dommastroj disponigis bonegajn loĝ- kaj laborkondiĉojn. Post la fermo de la arango la partoprenantoj forveturis kun plenplenaj notkajeroj, kontentaj pri la rezultecna laboro kaj de la agrable restado.

MARIN BACEV.
Gödölö — julio, 1981

JAMBOL. La 18-an de junio okazis raporta konferenco de la distrika organizo de BEA. Raporton faris Dimo Trudoljubov, prezidanto de la Distrikta-Urba Estraro. Li prezentis la multajn kaj variajn iniciatojn de la e-istoj pri lernado de E-o. En la lernejo 1980/1981 okazis ok kursoj por komencantoj kaj unu kurso por progresintoj. Oni trapasis ekzamenojn de unua kaj dua gradoj pri posedo de la Internacia Lingvo.

GEORGI VÁLEV

Pli ol 100 partoprenantojn el Hungario, Bulgario, Pollando kaj Ĉeĥoslovakio kunvenigis la IV BBB* E-Renkonto en Brno. Oni festis la 80-jariĝon de la loka E-klubo.

La solena kunveno pasis sub la signo de la jubileo. La prezidanto de la E-klubo Jozef Vondrušek faris historian superrigardon de la multjardeka agado. Sekvis salutparoloj de reprezentantoj de Hungario, Pollando kaj Bulgario. Je la nomo de CE de BEA salutis Ĥristo Kanjev.

Okazis en- kaj eksterurba ekskursoj. Kun intereso oni trarigardis la turon de la malnova urbodomo kaj la monumenton al la paco. Estis vizititaj ankaŭ vidindaj kavernoj. La interkna kaj la belarta vesperoj pasis en gaja etoso kaj kontribuis al la bona humoro de la partoprenantoj.

La renkontiĝo estis utila kaj agrabla E-aranĝo, en kiu oni ligis novajn konatecojn kaj interŝanĝis pozitivajn spertojn pri la E-laboro en privataj interparoloj.

H. K.

* Bratislava, — Brno — Budapest

ĜOJAJ TAGOJ EN TOKAJ

La 18–29 de junio ĉ. j. lernanta E-grupo el urbo Svoĝe (distrikto de Sofio) kun gvidantino Elena Radenkova partoprenis en la Somera E-Tendaro en urbo Tokaj (Hungario).

Niaj grupanoj, lerninte la Internacian Lingvon kun hungaraj infanoj, travivis neforgeseblajn tagojn de internacia amikeco. Esperanto bonege servis kiel komunikilo. La lernotagoj en amika etoso forpasis rapide. Okazis interkonaj vesperoj, E-programoj, recitaloj, boatekskursoj laŭ rivero Tisza, rigardado de la urboj Miŝkolc, Tokaj, Saroŝpatok kaj Budapeŝto. La hungara ĉefurbo ravis nin per sia ĉarmo kaj belegaj vidindaĵoj. Ni havis la plezuron viziti la amuzparkon, la insulon Margit, la altajn Gelert k. a.

Ni forlasis Tokaj kun sento de profunda dankemo al la estraro de la tendaro pro la zorgoj kaj la bonaj kondiĉoj. En niaj koroj postrestis bonegaj impresoj pri la atingiĝoj de nuntempa Hungario.

E. R.

La DE de BEA — Loveĉ, okazigis por la dua fojo en v. Borima E-seminaron. Ĝin partoprenis e-istoj kaj amikoj de E-o el Hispanio, Hungario, kaj Bulgario (Sofio, Plovdiv, Pleven, Vidin, Haskovo, Pazargik k. a.). La E-kursoj por komencantoj kaj progresintoj estis lerte gvidataj de la konata E-lektoro Ivan Liŝev el Trojan. La kursojn partoprenis ankaŭ e-istoj el la urboj Teteven, Lukovit, Letnica kaj v. Stojanovo — lokoj, kie la DE de BEA planis vigligi la E-movadon kun intenco fondi E-societojn. Finlumis 12 personoj, kiuj ricevis diplomojn de I grado de posedo de E-o.

La plej fervoraj gekursanoj aliĝis al la Internacia Arkeologia E-Laborbrigado en v. Debevo.



Varia estis la programo de la seminario. Paralele kun la intensa lernado de E-o, la seminarianoj ripozis kaj amuziĝis. Atentokapta programero estis la ekskursoj al vidindaj historiaj lokoj en la ĉirkaŭaĵo de urbo Trojan. Ili vizitis la tiean historian muzeon, la monaĥejon de Trojan, la ekspozicion de la popola arto en v. Oreŝak kaj la natursciencan muzeon en v. Ĉerni Osam.

La partoprenantoj forveturis kun agrablaj rememoroj pri la dektaga intensa E-lernado kaj la emociaj travivaĵoj en amika medio.

KIRIL KALĈEV

KAZANLÂK: La 14an de junio okazis regiona pedagoga E-renkontiĝo. Ĝin partoprenis kursgvidantoj kaj E-istoj el la distriktoj de Stara Zagora, Gabrovo, Sliven, Jambol.

Oni aŭskultis raporton pri la pedagoga E-laboro en la koncernaj distriktoj. Modelan lecionon je temo „Refleksivaj pronomoj“ faris Neno Janev el Gabrovo. Estis planitaj konkretaj rimedoj por sukcesa komenciĝo de la nova E-lernojaro.

La gastoj vizitis la Domon-monumenton de BKP kaj aliajn kulturhistoriajn vidindaĵojn.

I. GEORGIEV

ALVOKO AL LA BULGARAJ ESPERANTISTOJ-INSTRUISTOJ

Kiel estas jam konate al ĉiuj bulgaraj esperantistoj, ekde septembro ĉi-jare, en la IX klaso de ĉiuj mezgradaj lernejoj eblas fakultativa instruado de Esperanto. Sed ne ĉiuj esperantistoj-instruistoj rajtas instrui la Internacian Lingvon. Tial ni atentigas la esperantistojn-instruistojn nepre perfektigi en Esperanto kaj fari ekzamenon pri instruistoj. Laŭ nia scio, ne ĉiuj esperantistoj-instruistoj estas membroj de la Instruista Sekcio kaj ne havas kontakton kun ties estraro. La membreco en la IS estas senpaga. Sufiĉas sendi sian plenan adreson al la sekretario de IS Marin Băcev, 1000 Sofio, P. K. 1054, aŭ rekte al la adreso de BEA, 1303 Sofio, Bul. Ĥr. Bofev, 97.

Ĉiu membro de IS ricevas senpage ties bul-tonen INFORMILO, kie oni povas trovi ĉion koncerne la E-instruadon enlande kaj eksterlande.

La Estraro de IS ĉe BEA

EN BULGARIO—KOMISIITO DE UEA PRI LINGVO-SERVO

Jen nova honoro por la bulgara Esperanto-movado: la Komitato de UEA nomis komisiiton pri la Lingvo-servo la konatan bulgaran esperantiston Violin Oljanov, prezidanton de la Internacia Unuiĝo de la Esperantistoj-Filologoj kaj ĉefredaktoron de revuo „Paco“. Nia samideano estis komisiita pri tiu respondeciga funkcio kune kun ankoraŭ 4 elstaraj esperantistoj: 2 el Japanio, unu el Usono kaj unu el Britio.

Laŭ la regularo oni povas sin turni al komisiito kun demandoj pri diversspecaj lingvaj demandoj (gramatiko, elparolo, vortsignifoj k. a.), pagante la koston por respondo (por Bulgario, enmetante poŝtmarkon de 5 stotinkoj).

Oni devas klare skribi sian adreson kaj laŭeble kelkajn vortojn pri si: kiam kaj kie lernis Esperanton kaj kian gradon oni finis.

Grava atentigo: la komisiitoj ne estas devigataj korekti aŭ revizii manuskriptojn. Direktu nur tiajn demandojn, kiujn ne povas solvi la lokaj Esperanto-instruistoj kaj la ceteraj bonaj esperantistoj. Ĉion direktu al adreso: 1404 Sofio, kv. Emil Markov, PK 66, Violin Oljanov

ESPERANTO-ASOCIO EN GDR

Kiel estas konate, en Germana Demokratia Respubliko ekde 1965 aktive kaj celkonscie agadas esperantistoj en la kadro de la prestiĝa kulturassocio „Kulturligo de GDR“. La centra gvidorgano de la esperantistaro estis Centra Laborrondo Esperanto, CLE, kiu en 1976 fariĝis kolektiva membro de UEA. Tamen, ne malofte la GDR-esperantistoj konstatis, ke en eksterlando oni tute ne bone komprenis, kio estas tiu „Centra Laborrondo“. Por forigi tiujn malkomprenojn kaj krei strukturon, kiu respondas al la internacie kutimaj, la prezidio de Kulturligo de GDR decidis ŝanĝi Centran Laborrondon al „Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR“ en la III Centra Konferenco de la Esperantistoj en Kulturligo de GDR, kiu okazis la 23—24 de majo 1981 en Karl-Marx-Stadt. La konferenco entute partoprenis 190 esperantistoj el GDR kaj 20 eksterlandaj gastoj el Bulgario, CSSR Pollando, Rumanio, Sovetunio kaj Hungario. Universalan Esperanto-Asociacion reprezentis ties vicprezidanto d-ro Renato Corsetti, Italio.

La kreo de la asocio fakte oficialigis ion, kio jam antaŭe ekzistis, ĉar la esperantistaro organizita en KL ja praktike laboris kiel asocio, havis siajn gvidantarojn, organizis konferencojn sur diversaj niveloj kaj agadis internacie. Tamen, la fando de la asocio ne estas nur simpla formala akto. Ĝi indikas la atingon de certa respektinda nivelo de la laboro kaj markas novan etapon. Tio reflektigas en la novaj gvidprincipoj pri la agado de la Esperanto-Asocio. Ekzemple tie oni mencias unuanfoje pri la neceso de interlingvistika, esperantologia kaj sciencaplika agado.

Prezidanto de Esperanto-Asocio de GDR elektigis s-ro Hans Heinel, Rudolf Hahlbohm fariĝis vicprezidanto kaj d-ro Detlev Blanke, sekiestro por Esperanto en Kulturligo, estas la sekretario de la asocio.

La konferenco havis altnivelan enhavon: raporto kaj 16 diskutkontribuoj en la du plenkunsendoj kaj ĉirkaŭ 50 pluaĵoj en 4 laborgrupoj. La konferenco donis riĉan superrigardon pri la atingoj kaj fendaĵoj.

Valoras substreki la altan rekonon flanke de la asocio, aparte de Kulturligo mem, kiun ĝuas la esperantistoj de GDR. Tion klare substrekis la elparoloj de la vicprezidanto de Kulturligo, prof. d-ro Eduard Steiger, de la vicsekretario de KL, d-ro Gerhard Mortink kaj de la prezidanto de la distrikta organizaĵo de KL en Karl-Marx-Stadt (35 000 membroj) d-ro Hans Uhlig, kiu parolis en Esperanto.

Gravan pliriĝigon al la programo donis la eksterlandaj gastoj per siaj salutvortoj kaj prelegoj. Pri „UNESCO kaj UEA“ prelegis d-ro Corsetti, pri „Tradukado de nacia literaturo esperanten, sovetaĵoj“ raportis la vicprezidanto de ASE Vladimir Samodaj. Omago al la 1300-jara ekzisto de Bulgario prelegis Violin Oljanov pri „Bulgaraj laboristaj esperantistoj en la batalo por libera Bulgario“ kaj d-ro Arpad Mathe el Budapeŝto prezentis referaĵon de Otto Haszpra pri „Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko“. La kulturprogramon partoprenis la bulgara kantistino Maria Angelova.

BUSTO DE ZAMENHOF

En Odeso kreadis la skulptisto-esperantisto Nikolaj Blajkov (1898—1970). Okaze de la 100-jara jubileo de d-ro L. L. Zamenhof li decidis skulpti buston de nia Majstro kaj sendi ĝin al ties naskiĝurbo Bjalostok. Bedaŭrinde Blajkov ne sukcesis fini la skulptaĵon je la solena festo kaj la busto restis en Odeso.



La odesa esperantisto Georgij Osipov pretigis specialan piedestalon por la busto. Li almetis ankaŭ tabuleton kun ruslingva surskribo: „D-ro L. L. Zamenhof, kreinto de la lingvo Esperanto. Skulptisto N. V. Blajkov.“

Ekde 1965 la busto de Zamenhof staras en la korto de la domo de Blajkov. La odesaj esperantistoj okaze de festoj kaj gravaj datrevenoj vizitas la Zamenhof-skulptaĵon kaj metas florbukedojn.

N. SIGAL—PODOLSKIJ

LA LENINGRADA E-TEATRO LUDIS «HAMLETON»

En julio en Tartu (Estonio) gastis la Leningrada E-Teatro. La konata teatra trupo, kies spektaklojn oni vidis jam en multaj sovetiaj urboj, prezentis ĉi-foje la eternan „Hamleto“ de W. Shakespeare en traduko de L. L. Zamenhof. Ludis nur du aktoroj — Genadij Rudenko kaj Aleksandr Iovlev. Ili ankaŭ realigis la modernan kaj riĉan je esprimrimedoj surscenigon. Bone efikis sonefektoj. Oni iomete ŝanĝis la temon kaj mallongigis la tekston. Tamen la prezentado estis tute integra kaj ĝuinda.

La tartuaj esperantistoj kaj iliaj gastoj el la litova urbo Panevėžys longe aplaudis kaj revokis la aktorojn al la scenejo.

MADIS LINNAMÄGI

SCIENC-TEKNIKA E-KONFERENCO EN ESTONIO

En majo en Tallinn okazis la Unua Cebalta Scienc-teknika E-Konferenco je temo „Apliko de Esperanto en scienco kaj tekniko.“ Ĝin aranĝis la Estona Filio de ASE sub la gvidado de la estro de scienc-teknika fako doc. V. Hromov.

La unua parto de la konferenco pritraktis lingvistikajn problemojn. Prelegis la scienc kunlaboranto de la Akademio de Sciencoj de USSR Sergej Kuznecov (Moskvo) pri „La etapoj de evoluo de la interlingvistiko“, doc. V. Hromov (Tallinn) pri „Esperanto kiel lingvo de la scienco“, J. Ojalo (Tallinn) pri „Interlingvistiko en Estonio“, M. Burmeister (Riga) pri „Rudolf Lubeks — la unua esperantisto en Latvio kaj Brazilo“ kaj J. Palu pri „Praktika instruado de Esperanto en la lernejoj de Estonio“.

Oni traktis fakajn temojn en la dua parto. La docento pri geografiaj sciencoj M. Vabar (Tartu) esprimis la opinion, ke Esperanto estas tre konvena lingvo por sistemigo de geografiaj nomoj. La ingeniero pri grundplibonigo Erikas Laiconas konigis la situacion de la ter-plibonigo en Litovio. La docento Heino Relvik (Tallinn) prelegis pri la matematika temo „Ekvacio de ebla potenco“. Fine la latva futurologo A. Kalnins pritraktis eventualajn lingvajn evolu-problemojn en la estonto.

La konferencon ĉeestis pli ol sesdek esperantistoj, inter kiuj la prezidanto de la Estona Filio de ASE Ferdinand Eisen, sciencistoj, pedagogoj kaj aliaj fakuloj. La gvidanto de la scienc-teknika fako de ASE A. Gončarov (Moskvo) emfazis la gravecon de la konferenco kaj proponis aranĝi ĉiujare similajn sciencajn E-konferencojn.

J. PALU

ABONIGO AL REVUO „SCIENCA MONDO“ POR 1981 ANKORAŬ EBLAS!

ĈIU ESPERANTISTO — ABONANTO DE „SCIENCA MONDO“!

La revuo „Scienca Mondo“ estas grandformata, 32-paĝa, interesa ne nur por sciencistoj, sed ankaŭ por ĉiu esperantisto. Ĝi aperas 4-foje jare kaj estas malmultekosta. La jara abonotizo estas nur 1.50 levoj. Ĝi estas ankaŭ bonega donaco por eksterlandaj amikoj. La abonpago por socialismaj landoj estas 3.02 lv. kaj por nesocialismaj — 3.34 lv.

La mendon kaj la ĝustan adreson sendu al: Asocio de Sciencaj Laboristoj en Bulgario, bul. „Tolbuhin“ 18, 1000—SOFIO, kaj la sumon transpagu al Dŝrjavna spestovna kasa (DSK), Sofijski gradski klon, konto 185-II-5005.

JUNECO, ANTIKVAĴOJ, INTERNACIA AMIKECO

(RAPORTAĴO EL V. DEBNEVO, DISTRIKTO DE LOVEĈ)

Vicoj da ĝejnuloj el la Internacia Esperantista Labor-Brigado Arkeologia (IELBA) iras tra la centro de vilaĝo. Debnevo al la altaĵo „Kaŭto“. Baldaŭ oni pfoĉos la grundon, la puŝaretoj zigzagos sur la altaĵo. La labortago komenciĝos...

Ĝejnuloj-esperantistoj el kvin landoj — Bulgario, USSR, Pollando, Hungario, Hispanio venis en Debnevo'n por partopreni en la arkeologiaj fosadoj, gvidataj de Ivan Zahariev el la Nacia Instituto pri Konservado de Kulturmonumentoj en PR Bulgario. Intereson al la arkeologiaj esploroj en tiu loko provokis multaj publikaĵoj en bulgaraj kaj alilandaj gazetoj, dediĉitaj al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato, al ties historio kaj kulturo.

Arkeologiaj fosadojn en tiu historia loko oni daŭrigas jam kelkajn jarojn. Centoj da trovaĵoj estis trastudataj fare de specialistoj — historiistoj kaj arkeologoj, kiuj faris valorajn kaj ege interesajn sciencajn komunikojn.

Preskaŭ ĉiutage apartaj laborgrupoj elfosas novajn kaj novajn trovaĵojn: kuprajn monerojn el la epoko de reĝa familio Siŝman; arĝentajn monerojn el la periodo de regado de caro Ivan Aleksandăr; romiajn monerojn, ferajn sagojn, antikvajn tranĉiletojn, fragmentojn de ceramikaĵoj... Ĉiu trovaĵo estas zorge konservata por plua esplorado.

La plimulto de la brigadanoj vizitas unuafoje Bulgarian kaj estis avitaj de la lando, de ties loĝantaro.

La Internacia Lingvo Esperanto helpas al ĉiuj brigadanoj interkompreniĝi.

Rezulte de la penoj de la DE de BEA — Loveĉ, la internacia E-brigado en vilaĝo Debnevo laboris kaj vivis kolektive, fruktodone kaj gaje dank'al la zorgoj kaj la sperta gvidado de ĝia stabo. Jam tuj post ilia alveno en la brigadotendaron la bulgara, la sovetiaj kaj la hungaraj brigadanoj organizis komsomolan societon, kies sekretario estis elektita Ljubina Gerasimova — studentino el Haskovo.

Laŭ iniciato de la societa komsomola estraro, la brigadanoj helpis ankaŭ la agrikulturajn laborojn en la ĉirkaŭaĵo. Estis organizita vespero, dediĉita al la 1300-jara jubileo de Bulgario, kies gasto estis la eminenta bulgara verkisto Dimităr Mantov. Bone aranĝitaj estis ankaŭ la vesperaj kulturaj programoj de la brigadanoj el USSR kaj Hungario.

La riĉenhava labora kaj kulturkleriga plano, preparita fare de brigada stabo, disponigis al la partoprenintoj ne nur emocian kaj ege interesan laboron, sed ankaŭ diversajn amuzojn, vizitojn al kulturhistoriaj vidindaĵoj, kiuj riĉigis la programon de la brigadaj tagoj.

Memkompreneble, la „animo“ de la brigado estis bulgaraj junaj geesperantistoj, kiuj varme akceptis la fremdlandajn brigadanojn kaj entuziasmigis ilin por rezultodona laboro kaj por amikaj amuziĝoj.

La modela laboro kaj la amika konduto de la bulgaraj brigadanoj al la fremdlandaj partoprenintoj en la IELBA multe kontribuis al ties bonegaj impresoj de vilaĝo Debnevo, de niaj popolo kaj lando.

PEJO DULEV



Preskaŭ ĉiutage la brigadanoj elfosadis novajn trovaĵojn...

ESPERANTO-PALACO EN LA MONTARO DE ORFEO



La Internacia E-Kursejo en v. Pisanica

REALIGITA FANTAZIAJO

— Kiam ni uzas akuzativon?
— Kiuj estas la partoj de la homa korpo?
— La Ĉe-instrumentado celas kapti la atenton de la gekursanoj. . .

— Per kiu kanto ni finu la lernohoron. ?
El la klasĉambroj de la Internacia E-Kursejo (IEK) en Pisanica aŭdiĝas la voĉoj de kursgvidantoj kaj la horaj respondoj de la gekursanoj. En tiu sunbrila aŭgusta antaŭtagmezo bolas streĉa kvarhora instruado.

Cu iu povus imagi, ke en la bela Meza Rodopi-Montaro, inter la dissemajtaj sur la krutaj altaj dometoj en vilaĝo Pisanica, troviĝas neĝblanka konstruaĵo kun mirinde rava alpeca aspekto? Super ĝi strasgranda verda lumstelo kaj sur la fronta fasado de malproksime vidiĝas la lumŝildo „Internacia Esperanto-Kursejo“. Tiu valora akiraĵo por la bulgara kaj eksterlanda esperantistaro estas unika en la mondo — vera E-palaco en la montaro de la legenda traka kantisto Orfeo! . .

La ideo pri la konstruado de la E-domo en Rodopi-montaro ŝajnis nerealegebla fantazio, ĉar vere estis fantaziulo tiu, al kiu apartenis la projekto — la malnova, ekde siaj gimnaziaj jaroj E-aktivulo Jordan Jordanov. Titana estis lia lukto kontraŭ la

antaŭjuĝoj kaj la obstakloj, kiujn li renkontadis survoje al la realigo de l'ideo. Estis momentoj, kiam li devis oferi eĉ siajn proprajn monrimedojn por antaŭenpuŝi la konstruadon (kiu daŭris 1976—1979): plilarĝigi la krutan montan vojeto al Pisanica, transportigi milojn da brikoj kaj konstrumaterialon, klopodi ĉe registaraj kaj financaj institucioj por ĉiu bezonata levo (ĉar la elspezoj estis grandegaj — pli ol 1,4 miliono da levoj). Sed li ne estis sola! Subtenis lin fervore kaj sindone la esperantistoj de Smoljandistrikto, nombrantaj 800 membrojn de 15 E-societoj (ili dediĉis pli ol 1000 libervolajn labortagojn al la konstrulaboroj). Subtenis lin la gvidantoj de la bulgara E-movado; subtenis lin ĉefe nia popola registaro kaj la Bulgara Komunista Partio. Ĉar la afero de la bulgaraj esperantistoj havas malnovajn revoluciajn tradiciojn profunde ligitajn kun la batalo de la plej progresemaj fortoj kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo; ĉar multaj batalantoj portis surbruste krom la ruĝajn rubandojn, ankaŭ la verdan stelon; ĉar multaj estas hodiaŭ la eminentaj registaraj kaj partiaj funkciuloj, kiuj mem estas esperantistoj, arde simpatias kaj subtenas la

noblan agadon de la bulgara E-movado.

Enirante tiun veran E-palacon, frapas je unua rigardo la moderna kaj luksa arango de ĉiu anguleto: helaj klasĉambroj kun bonaj lernokondiĉoj, aŭdkabineto kun ekipaĵoj por 20 personoj, elegantaj antaŭsalonoj kun televidilo en ĉiu etaĝo, 60 du-, tri- kaj kvarlitaj dormĉambroj kun tualetejo kaj duŝo, 4 apartamentoj kun ĉiuj oportunaĵoj. La domo funkcias la tutan jaron kun kapacito 220 personoj. Vasta manĝejo proponas bengustajn manĝaĵojn de la bulgara kuirarto. Vespere post la streĉaj lernohoroj la gekursanoj povas

danci kaj amuziĝi en la bone ekipita disko-baro kun 150 lokoj.

La konstruaĵo situas je alteco pli ol 1000 metrojn super la marnivelo sur areo de 9 dekaroj, el kiuj 6 estas destinitaj por sportejoj. Antaŭ la domo estas bela florgardeno kun busto-monumento de d-ro Zamenhof, skulptita de la bulgara esperantisto Georgi Harizanov el Plovdiv.

La kursejo disponigas ĉiujn necesajn laborokondiĉojn por konferencoj, seminarioj, kunidoj kaj aliaj E-araĝoj en landa kaj monda skaloj.

INTERNACIA KULTUR-KLERIGA CENTRO

Por la unua fojo ĉi-jare la klasĉambroj de la domo vigligis: 120 gekursanoj el Ĉeĥoslovakio, GDR, Hungario, Rumanio kaj Bulgario partoprenis en la Internaciaj E-Kursoj — I, II, III-gradaj kursoj kaj metodika kurso por E-instruantoj. Grava faktoro por progreso de la E-movado en Bulgario estas la decido de la Ministerio de Popola Klerigo por fakultativa lernado de la Internacia Lingvo en la 9a klaso de la ĉiuspecaj mezlernejoj. Tio ja postulas spertajn E-instruistojn, kies vicoj pliriĉiĝos per novaj kursgvidantoj, finintaj la Internaciajn E-Kursojn en Pisanica. Dum la dudektaga restado la gekursanoj havis multajn agrablajn programerojn: vizito al la distrikta urbo Smoljan, kie ili havis emocian travivaĵon en la loka planetario kun astronomia spektaklo en Esperanto; la tradicia folkloro festivalo „Roĵen '81“ ko-

nigis al ili la riĉecon de la rodopa popularo — tradiciaj popolkostumoj, kantoj, dancoj, popolaj kutimoj sur kvar subĉielaj podioj; busekskursoj al la internacie konata monta ripozloko Pamporovo, kie oni supreniris per lifto la televidturon sur Snejanka-montopinto. La ŝatantoj de piedekskursoj migradis laŭ variaj itineroj al la lagoj de Smoljan, montopinto Kozujatak, la masivo de Perelik, ripozloko Hajduŝki Poljani k. a. En la regiono oni vizitis ankaŭ la montogorĝon kaj rokojn de Trigrad, la arkitektur-folkloran kaj etnografian rezervejojn Siroka Laka, la Nacian Astronomian Observatorion ĉe Roĵen. Kompreneble, la gekursanoj ne preterlasis sunbruniĝi sur la verdaj tapiŝoj de la apudaj ĉe la domo herbejoj...

Kaj nun ni donas la parolon al la direktoro de la Internacia E-Kursejo



Gekursanoj en la ĉi-jaraj E-kursoj en IEK — Pisanica



Sons rodopaj popolmelodioj en
Roĵen-festivalo...

KUNĈO VALEV — ĉefsekretario de BEA:

— Havi propran modernan instrubazon — tio delonge estas kara revo de la bulgaraj esperantistoj. Nun tiu ĉi revo jam estas realo.

En la ĉi-jaraj someraj 20-taga Internacia E-Kurso por instruistoj de Esperanto partoprenis pli ol 100 gekursanoj el 6 landoj. Ili formis 4 klasojn depende de sia lingva nivelo — por komencantoj, por progresintoj, por supera lingvokono kaj pri metodiko de E-instruado. La klasojn gvidis Penka Bujuklieva el Gorna Orjahovica, Fani Mihajlova el Plovdiv, Neno Janev el Gabrovo kaj Kunĉo Valev el Sofio. La instrulaboro estis serioza, altnivela. Regis entuziasmo kaj spirito de nobla konkurado inter la gekursanoj. Fine okazis ekzamenoj por ĉiu grado. Sukcese trapasis ilin 60 gekursanoj. Diplomiĝis pri instruarjo de Esperanto 20 personoj. Ili ricevis ŝtatajn diplomojn de la Distrikta Direkcio de Popola Klerigo en u. Smoljan.

La kursano plejparte konsistis el junuloj kaj mezaĝuloj. Aparte ĝojiga estas la fakto, ke konsiderinda nombro de ili estis profesiaj instruistoj. Tio evidente rezultas el la decido de la Ministerio de Popola Klerigo pri enkonduko de fakultativa instruado de Esperanto en la naŭan klason de ĉiuj mezlernejoj en la lando. Sed favora kaŭzo pri tio estas sendube ankaŭ la kreskanta intereso de nia socialisma socio al la Internacia Lingvo kaj al la riĉa ideaduka patriotisma kaj internaciisma laboro de la bulgaraj esperantistoj. Nun la bezono pri lingve kaj metodike bone preparitaj instruantoj de Esperanto estas tre granda. Dum la sekvantaj jaroj tiu ĉi bezono kreskos pli kaj pli.

Ni kredas, ke la Internacia E-Kurso en Pisanica, garantante plej bonajn lektorojn el la lando kaj eksterlando, kune kun la bonaj loĝ- kaj lernokondiĉoj, baldaŭ transformiĝos en renomatan establejon, kien amase venos bulgaroj kaj fremdlandanoj por lerni kaj perfektigi en la Internacia Lingvo Esperanto. Kaj samtempe ĝi estos praktika forĝejo de la spirito de amikeco kaj kompreniĝo inter homoj kaj popoloj, de paco en la mondo — vere internacia kultur-klerna E-centro.

ING. JAN ROĈKAR —

Bratislava, CSSR:

— En la Internacia Esperanto-Kurso en v. Pisanica mi studis en la triagrada E-kurso, gvidata de la sperta instruisto Neno Janev. Li multe kaj sukcese strebis klarigi al ni la tutan studmaterialon, prepari nin por la ekzameno. Ĉiuj gekursanoj tre estimis kaj amis lin kiel instruiston kaj homon. Al li ni ŝuldas la plibonigon de nia lingvokono dum la 20 tagoj de instruado.

Tre ĝoja kaj emocia estis la preparo por la amuz-vespero, organizita kun la partopreno de ĉiuj gekursanoj kaj instruistoj. Ĝi estis vere internacia vespero de la amikeco kaj de la ĝojoj!...

NIKULINA DOMINTEANU —

Bukureŝto, Rumanio:

— Mi tre ĝojas pro mia partopreno en la Internacia E-Kurso en Pisanica, ĉar mi multon ellernis de la riĉa instruprogramo kaj akiris novajn sincerajn geamikojn. Mi ĝius la mirinde belajn vidindaĵojn de Rodopi-montaro en ĝiaj plej pitoreskaj regionoj. Neripeteblan impreson faris al mi la partopreno en la popola festo en Roĵen, kie mi povis vidi la riĉecon de la bulgara rodopa-folkloro. Mi estas certa, ke Esperanto ankoraŭ pli profunde ligos niajn du fratajn popolojn kaj tiu E-palaco renkontigos estonte pli kaj pli multajn rumanojn kun geesperantistoj el diversaj landoj.

ING. MILORAD ĜURĜEVIĆ —

Smederevo, Jugoslavio:

— En la Internacia E-Kurso en Pisanica mi denove eksentis la ardan kaj sinceran gastamon de via popolo, al kiu mi estas speciale dankema. Ĉar miaj plej junaj jaroj estas profunde ligitaj kun Bulgario. Antaŭ 36 jaroj, kiel 14-jaraĝa knabo, mi restis dum la tuta 1945 jaro en urbo Trojan. Tiutempe la Dua Mondmilito ankoraŭ daŭris. Laŭ invito de la elstara gvidanto de la bulgara popolo Georgi Dimitrov en vian landon estis senditaj pli ol 13 000 jugoslavaj infanoj — orfoj aŭ perdintaj diversmaniere siajn gepatrojn, kiuj estis akceptitaj kiel propraj infanoj de multaj bulgaraj familioj. En via lando mi ankaŭ trovis denove tegmenton kaj gepatran varmecon, ĉirkaŭita de la zorgoj de miaj gastamaj kaj ĝentilaj parencoj el Trojan. Nun mi denove estas inter bulgaraj geamikoj, kiujn mi renkontis en tiu vera E-palaco, kaj mi estas tre dankema al niaj ĝentilaj dommastroj pro ilia korvarma afableco. Baldaŭ la E-kurso en Pisanica estigos nia internacia hejmo.

LJUDMILA HIPIUS —

Eisenhüttenstadt, GDR:

— En la kurso, kiun mi partoprenis, mi aŭdis kelkajn provokojn kaj admiris la spertecon de la junaj geinstruistoj. Nia majstro estis samideano Kunĉo Valev, kiu plenumadis siajn instruplanojn kun granda pacienco, bonhumoro kaj lingvokono. Por mi li estas modela instruanto.

Dum mia dudektaga restado en Pisanica mi akiris novajn lingvokonojn kaj ĝuis la varman, karan atmosferon de amikeco en nia rondo.

Pisanica,
aŭgusto, 1981

DONČO ĤITROV
EVGENI GEORGIEV



Docento ILIJA BOJKOV

LA UNUA KOMERCA KONTRAKTO DE BULGARIO

En la jaro 716, kelkdekoj da jaroj post la fondiĝo de la bulgara ŝtato, estis farita kontrakto kun Bizanco. Kelkaj el ĝiaj paragrafoj reguligas la formigantajn komercajn rilatojn inter la du najbaraj landoj. Tial oni akceptas, ke tio estas la unua el ĉiuj komercaj kontraktoj, kiujn faris Bulgario en la daŭro de sia 1300-jara historio.

La enhavo de la kontrakto estas citita nur en la kroniko de la bizanca analizo Teofan. La plejparton li transdonas per propraj vortoj. Teofan rakontas pri la teritoriaj konkeraĵoj de Bulgario kaj pri la amplekso de la reparacioj, kiujn devis pagi Bizanco. La lasta paragrafo koncernas problemojn de la eksterlanda komercio.

La kontrakto aperis kiel rezulto de la konsekvenca kaj celdirektita eksterlanda politiko de la bulgara hano Tervel. Li bone konsciis, ke la diplomatio kaj la komercio posedas forton ne malpli grandan ol armiloj. En la komenco de la VIII jarcento Tervel, elmontrante antaŭvidemon, enmiksiĝis en la intercivitane batalon por la bizanca trono kaj helpis al pretendanto, inklina efektiviĝi politikon de bona najbareco kaj de interkompreniĝo rilate al Bulgario. La armilon Tervel uzis nur en okazoj, kiam estis necese defendi la teritorian tutecon de la juna bulgara ŝtato, ĝiajn politikajn kaj ekonomiajn interesojn. Kaj malgraŭ la perfidado de kelkaj bizancaj imperatoj, li daŭre efektiviĝis politikon de paco kaj reciproke profitaj ekonomiaj rilatoj.



FLUGAS «INTERKOSMOS — BULGARIO 1300»

Bulgario denove estas en la Kosmo: la 7an de aŭgusto k. j. en Sovetunio estis lanĉita artefarita tersatelito „INTERKOSMOS — BULGARIO 1300“. Laŭ komentoj de la koresponda membro de Bulgara Akademio de Sciencoj prof. d-ro Kiril Serafimov, la ideo pri konstruo de la nova kosma objekto apartenas al kelkaj entuziasmaj bulgaraj fakuloj. En 1975 ili proponis al la tiama prezidanto de la konsilio pri la programo „Interkosmos“ — akademiano B. N. Petrov, la kreon de artefarita tersatelito por esplorado de la plazmaj, elektromagnetaj kaj optikaj fenomenoj de la magnetosferaj-jonosferaj reciprokaj efikoj. Tiuj esploroj havas grandan signifon el fundamenta popularscienca vidpunkto kaj rilatas al difino de fenomenoj, procedoj kaj fizikaj ecoj de la ĉirkaŭtera kosma spaco. Tiuj esploroj havas ankaŭ gravan signifon el vidpunkto de la plazma fiziko, ĉar en la magnetosfero kaj la jonosfero efektiviĝas plazmaj procedoj en libera stato, kiuj ege malfacile povas esti trastuditaj en laboratorioj kondiĉoj. Fine, la magnetosferaj-jonosferaj reciprokaj influoj estas la plej grava kaj nesufiĉe trastudita parto de la kolosa ponto de l'vivo, liganta la Sunon kun la Tero.

La fundamenta ideo pri la eksperimentoj kaj pri la komplekso de aparataro, muntita sur la bordo de la tersatelito „Interkosmos — Bulgario 1300“, estis trastudi kiel eble plej multnombrajn fundamentajn difinitajn parametrojn kaj grandecojn de la du reciproke influantaj unu al la alia sferoj — la magnetosfero kaj la jonosfero. La tasko estas ege malfacila, sed ĉe la bulgara artefarita satelito oni elektis alian, originalan skemon por difino de la parametroj de la interfektoj. La aparataro, muntita en la satelito, konsistas el 4 grupoj el entute 12 sistemoj kaj mekanismoj, kreitaj de bulgaraj sciencistoj kaj fakuloj. Ili daŭrigos la eksperimentojn „Daga“ (Cielarko), komencitajn en la kosmoŝipo „Sojuz-33“ de la bulgara kosmonaŭto subkolonelo Georgi Ivanov.


La granda kosma objekto estas rezulto de la sukcesplena evoluo de vico da scienc-teknikaj industriaj sferoj en socialisma Bulgario, ekzemple la elektroniko kaj la maŝinkonstruado.

La bulgara-sovetia kolektivo de sciencistoj kaj teknikistoj dediĉas la novan grandan kosman sukceson al la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato. La eksperimento estas nova manifestado de la fruktodona bulgara-sovetia amikeco kaj kunlaborado en la scienc-teknika sfero.

En la Kosmo jam sonas la signaloj de la artefarita tersatelito „Interkosmos — Bulgario 1300“ kaj gloras la novan venkon de la socialisma scienco.

RADI BANĈEVSKI

FORPASI OTTO BÄSSLER



E-veterano Otto Bässler*

La konata veterano de la germana kaj internacia laborista E-movado k-do Otto Bässler ne plu estas inter ni. La 15an de junio j. k. ĉesis pulsi lia hardita revolucia koro de vera patrioto de Germana Demokratia Respubliko kaj sincera, abnegacia internaciisto.

K-do Otto Bässler naskiĝis la 17an de januaro 1897. En sia juneco li elektis la profesion de presisto kaj orientiĝis al la batalema laborista movado. Li ne nur fariĝis konscia kaj klara adepto de la revolucia marksismo, poste evoluinta al marksismo-leninismo, sed ankaŭ praktike aktivis en diversaj klaslaboristaj kaj komunistaj organizoj. Tiamaniere li elkreskis kiel persono, kiu kunigas la vortojn kun la faroj. Tiel konsekvenca li restis dum sia tuta konscia vivo.

Lia bonega politika eduko montriĝis perfekte ankaŭ en lia esperantista agado. Li estis aktivulo de Germana Laborista Esperantista Asocio (GLEA) kaj subtenis la aga-

don de la fondita en 1921 Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT), ĝis kiam tiu internacia laborista organizaĵo konservis sian unuecfrontan revolucion platformon. Jam en 1931 fondiĝis la klasbatala Internacio de Proletaj Esperantistoj (IPE). IPE organizis tre gravan por tiu epoko gazetaran servon pere de Esperanto, nomatan mallonge PEK-Servo (Proleta Esperanta Koresponda Servo). Oni metis tiun novan formon de praktika utiligo de la Internacia Lingvo serve al la progresema diverslanda gazetaro. Kaj mi, kiel samtempulo de tiu PEK-Servo, povas atesti, ke k-do Bässler bonege organizis tiun internacian agadon, kiu alportis senriproĉan utilon al la afero de la revoluciaj neesperantistaj laboristaj organizaĵoj, pli speciale — al ties presorganoj. En la historio de la germana kaj internacia laborista E-movado por ĉiam restos pura la nomo kaj la agado de tiu perfekta, skrupulema kaj disciplinita soldato de la revolucio. En la iama ilustrita laborista gazeto en Germanio AIZ mi vidis foton, kiu montris momenton de laborista demonstracio en Berlino. Fronte marŝis la gvidanta komunista kerno. Ernst Thälmann staris inter liaj plej sindonaj kunlaborantoj, inter kiuj estis ankaŭ k-do Otto Bässler.

Multon oni povas diri pri la meritoj de k-do Bässler kiel en burĝa Germanio, tiel ankaŭ en GDR, kie li ne ĉesis labori aktive en la E-movado. Tie ĉi mi nur mencias pri niaj intimaj amikaj ligoj, kiuj daŭris ĝis lia morto. Nur du monatojn antaŭ sia forpaso li kaj lia vivkamaradino Frieda sendis al mi varman amikan salutleteron okaze de la ĉi-jara Unuamaja festo. Kaj mi, neinformita pri lia morto, skribis al li kaj Frieda amikan leteron la 9-an de julio... Tiu mia letero estu per Frieda plua sincera esprimo de mia malnova amo kaj ŝato al la elstara komunista-esperantisto Otto Bässler!

NIKOLA ALEKSIEV

* Portreto, pentrita de Inge Wunderlich. La bildo estas proprajo de la Muzeo por Historio de Leipzig.

Literaturo Artoj Kulturo

BERNARD GOLDEN

LA TRAGEDIO DE CERVEN

(Gajninta II premion en la literatura konkurso
de „Bulgara Esperantisto“ por 1981)

Estis belega somera tago en la vilaĝo Cerven: blankaj, vatecaj nuboj vagis sur lazura ĉielo, milda venteto tremetigis verdajn en apudaj arbaroj kaj kampoj, kaj la rivero Cerni Lom gracie meandris ĉirkaŭ la monto, superstaranta tiun ĉi idilian pejzaĝon.

Aŭtobuso plena de turistoj ĵus alvenis de la urbo Ruse tridek kilometrojn norde. La celo de la vizitantoj estis rigardi la ruinojn de la mezepoka fortikigita urbo, konstruita sur la krutaĵo. La ĉiĉerono gvidis sian grupon supren sur la deklivo al la parto de la urbo konata kiel la Citadelo, kies ankoraŭ starantaj arkitekturaj restaĵoj atestas la historian gravecon de la loko. Simeon Petrov, la gvidisto, juna studento el Sofio, kiu entreprenis someran laboron kiel turista ĉiĉerono, prenis sidlokon sur ŝtona muro vidalvide al la fundamento de la fortikaj preĝejo. Li atendis, ĝis lia „grego“ alproksimiĝis por aŭskulti informojn pri la historio de Cerven. Elpoŝiginte faskon da ŭltobligitaj folioj, li komencis legi.

„En la 13a jc. Cerven rolis kiel a eklezia sidejo. Du grandaj polita atedraro, troviĝis en la centro de la urbo, kaj sep pli malgrandaj preĝejoj situis aliloke. Guste en tiu jarcento ekflamis la bogomilisma herezo, kaj en 1211 la eklezio kunvokis koncilion por anatemi tiun malortodoksan dualismon. La bizancaj imperiestroj feroce militis kontraŭ la naciismaj bogomilistoj, kies celo estis liberigi la kamparanajn amasojn subpremitajn fare de grandaj terposedantoj kaj feŭdaj sinjoroj.“ Petrov ne finis sian frazon. Li decidis menci ion pri la nuntempa arkeologia prilaso en Cerven, ĉar li jam spertis, ke tiu temo ĉiam interesas la publikon. „Mi deziras montri al vi rezultojn de la plej lastaj arkeologiaj

esploroj. De 1962 ĝis hodiaŭ arkeologoj sisteme prilosis la tutan urbon kaj faris tre interesajn kaj valorajn malkovrojn. Rigardu tiujn ĉi defendmurojn. Laŭ la takso de fakuloj ili origine estis du metrojn altaj kaj tri metrojn larĝaj.“

La juna Petrov kondukis sian grupon al kvadratforma, malalta ŝtona konstruaĵo en la mezo de la korto.

„En tiu ĉi korto estis malkovritaj du gravaj konstruaĵoj, la malgranda preĝejo, kies fundamenton vi jam vidis, kaj ankau tiu ĉi cisterno. Granda problemo por la mezepokuloj estis la akiro de sufiĉe da trinkakvo. Unu el la ĉambroj de la defendturo servis kiel akvokolektaĵo kaj oni konstruis ankau tiun ĉi cisternon, en kiun fluis pluvakvo falanta sur la tegmentojn de la apudaj konstruaĵoj.“

Kelkaj scivolaj turistoj klinis sin super la randon de la rezervujo kaj ĉirrigardis, evidente serĉante akvon. Knabo faligis ŝtonon en ĝin, sed aŭdiĝis nur obtuza pum. . .

„Bonvolu atenti, tiuj, kiuj staras ĉe la cisterno, admonis Petrov, „aŭ viaj ostoj aliĝos al tiuj, kiujn oni elfosis.“

„Ostoj? Cu oni trovis ankau ostojn en ĝi?—demandis diletanta fotografanto kun tri filmaparatoj ĉirkaŭ la kolo. Lia edzino tuj vokis al siaĵ kunulinoj.

„Venu, aŭskultu tion ĉi! Estis mortintoj en la cisterno. Oni trovis la ostojn.“

Alkuris pli da homoj, eĉ kelkaj aliaj scivoluloj, kiuj ne apartenis al la grupo de Petrov. Tiu ĉi tute ne intencis paroli pri mortintoj. Fakte, la ostoj, plejparte en tre fragmenta stato, venis de bestoj kaj konsistigis tute ordinaran kuirejan forĵetindaĵon. Sed nun la ĉeestantaro estis preta aŭskulti historion pri iu grava evento, speco de homa tragedio, kiu finigis per morto. Antaŭ ol la per-

pleksigita Simeon povis pensi kiel elturniĝi, lia sekvantaro komencis pafi demandojn al li:

„Cu oni scias, kiel ili mortis? Cu eble okazis batalo?“

Petrov komencis ŝviti. Li devis rapide decidi pri la rakontintrigo. Li gravmiene klarigis, ke la antropologo, kiu ekzamenis la ostojn, asertis, ke ili apartenis al maskloj, unu mezaĝa, la alia maljuna.

Petrov komencis perdi sian timon, ĉar li konstatis, ke la spektantaro mem faras ian rakonton kaj li devas nur konfirmi ĉion, kion oni volas aŭdi.

„Jes — decide asertis li.—La arkeologoj elfosis ponardon kun klingo el rustiginta fero. Ĝi estis trovita inter la ripoj de la mezaĝa viro.“

„Ŝŝ!—ŝŝ!“, sibilis kelkaj apudstarantoj al aliaj, kiuj malĝentile babilis. „Nia gvidisto rakontos la krimmisteron pri la du kadavroj en la cisterno.“

... Estis malvarmeta aŭtuna nokto en la jaro 1251 — malrapide komencis rakonti Petrov. — Persiste pluvetis sur la monto, kaj la fortikaj korto estis senhoma, tute silenta. Subite viro kuris al la preĝejo, momente staris en la mezo de la korto, ĉirkaŭrigardante. Transe sur sia ŝultro li tenis pezan ledan sakon. Piedpaŝoj aŭdiĝis sur la ŝtuparo de la defendturo kaj elkuris maljuna monaĥo. „Haltu! Haltu, ŝtelisto! Mi vidis vin tra la fenestro. Vi ŝtelis ion el la preĝejo!“

La forkuronto hezitis, ne sciante kien kuri. Alproksimiĝis al li la monaĥo, vikle ŝvingante siajn pugnoj en la aero. Li kaptis unu el la brakoj de la ŝtelinto.

„Fripono! Kion vi havas en tiu sako? Vi estos punita pro via sakrilegio. Donu ĝin al mi tuj!“

La alfrontita viro provis liberigi sin, sed la sakego malhelpis liajn movigojn. Li stumblis ĉe angulo de la cisterno kaj falis.

La dika monaĥo tuj jetis sin sur lin kaj provis ekposedi la sakon. Kun ĉiu skuo de la sako aŭdiĝis la tintado de metalaj objektoj.

„Ha!“, rikanis la monaĥo. „Do vi ŝtelis orajn kaj arĝentajn ujojn, ĉu ne? Redonu ilin, fiulo! Ili apartenas al la eklezio.“

„De kie ŝtelis ilin la eklezio? — rebatis la alia viro. „De ni, de la popolo. Ĝi daŭre elŝutas nian sangon kaj ŝviton por pliriĉigi sin.“

„Haltigu vian langaĉon! Vi estas krimulo en la okuloj de Dio.“

„Kiu Dio?“

„Kiu Dio? Kion vi diras, blasfemo! Estas nur unu Dio, nia Dio!“

„Jes, mi konas vian Dion, la Dion de la Malbono, de la Mallumo.“

„Mal... Mallumo! Mallumo! Kion vi elbuŝigas? Vi parolas kiel tiuj damndindaj herezuloj, la bo... bogo... bogomilistoj!“ La vortoj malfacile elvenis el la ŝaŭmanta buŝo de la ekscitita monaĥo.

„Jes“, fiere respondis la kamparano. „Mi estas bogomilisto. Nia Dio estas la vera Dio, la Dio de la Bono kaj la Lumo. Via estas Satanael, la ribelema filo de Dio, la Diabolo, la Dio de la Mallumo.“

„Vi bogomilistoj brulos pro via aroganteo. La sinodo jam kondamnis vin.“

„Sed antaŭe ni revolucie renversos la nunan putran sociordon!“

Aŭdinte tiujn vortojn la monaĥo eĉ pli furioziĝis, sed ideo fulmis tra lia kapo.

„Aŭskultu! Donu la duonon de la enhavo de via sako, kaj mi lasos vin foriri.“

„Neniam!“ venis la tuja respondo. La tuta trezoro estos por nia Dio, por nia popolo, por ke ni povu detrui vian degenerintan eklezion.“

„Vi, aĉulo, kiu spitas nian eklezion! Mi montros al vi kia puno atendas vin.“ minace mugis la monaĥo. Dirinte tion, per sia libera mano li eltiris el la faldoj de sia robo longan ponardon. Kiam la kamparano vidis ĝin, li paliĝis de hororo, sed la sako restis en la prema pinĉo de unu el liaj manoj. Per la alia mano li provis forpuŝi la brakon de la monaĥo, descendantan kun la armilo enmane, sed li sukcesis kapti nur la longan barbon de sia atakanto.

La furioza monaĥo du-tri fojojn enigis la akran klingon de la ponardo en la bruston de la herezulo kaj faris ankoraŭ unu provon ekkapti la sakon. Sed tiam liaj sandaligitaj piedoj glitis sur la malekaj pavimŝtonoj antaŭ la cisterno; li perdis sian ekvilibron kaj lia peza korpego puŝiĝis kontraŭ la rando de la akvo-rezervujo. Unu post la alia la du viroj transkapiĝis en la truon. Poste regis la lumbra silento de profundakva tombo.

La absorbita spektantaro mirfrapite gapadis ankoraŭ kelkajn momentojn; poste ekplodis spontana, orelsurdiga aplaŭdado.

„Kio okazis poste?“ venis la

unua demando, kiam la ĉirkaŭstarantoj revenis en la realan mondon.

„La resto de la historio estas simpla“, aplombe klarigis la jam sperthava rakontisto.

... La sekvan tagon, kiam la komandanto de la fortikaĵo faris sian rondon de la fortikaĵo, li rimarkis la detruitan rando de la cisterno.

„Gustumi tiun akvon.“ li ordonis al unu el la subalternuloj. La oficiro enigis sitelon en la cisternon, eltiris ĝin kaj plenigis sian buŝon per la akvo.

„Pu!“ li grimace kredis kaj elkrakis la naŭzan likvaĵon.

„Guste kiel mi suspektis“, diris la fortikaĵestro. „Tiu ĉi akvo-kolektujo estas infektita. Versaj-ne ratoj aŭ hundoj enfalis pasintnokte. Plenigu ĝin per ŝtonruba. Estontece ni ĉerpu trinkakvon nur el la puto.“

„En la sekva jarcento“, daŭrigis sian rakonton Petrov, „okaze de la turka invado, la sekreto de la mezepoka tragedio de Cerven estis eĉ pli efike sigelita. En 1388 otomanaj konkerantoj prirabis kaj incendiis la urbon. Sur la ruinoj aperis novaj kvartaloj kaj la urbo akiris tute alian fizionomion. La turkoj alportis novajn arkitekturajn konstruaĵojn — moskeojn, minaretojn, banejojn.“

La tragedio de Cerven dum jarcentoj — ĝis nia nuntempo restis sekreto.

PENKA PAPAZOVA — I premio en la literatura konkurso de „BE“

MIA SANKTA TER'

Mi amas vin,
mia sankta ter',
tero de miaj praaĵoj,
saturita de sango,
kovrita de ostoj.

Tero de herooj,
mortintaj en batalo
por justo kaj liber'.

Mi amas vin,
mia naskiĝa ter',
riĉa, malavara,
donanta vivon al ĉio.

Mia floranta ter',
kaŝinta en viaj sulkoj
doloron kaj panon. . .

Mi amas vin printempe,
karesata de suno,
kaj aŭtune,
kliniĝanta de fruktoj.

Tero antikva kaj juna.
Tero glora kaj forta.
Naskita en bataloj.

Mia sankta ter',
patrujo mia kara,
mi amas vin!

K O N F E S O J

Mi deziras donaci
al vi la sunon,
kiu leviĝis
en mia koro.

Mi volas
donaci al vi
la bukedon
de steloj,
kiuj ekbrilis
en mia animo.
Donu al mi
vian manon,
por eksenti
la helon. . .

Ne tuŝu la koron
per fingroj, —
falos gutoj de sango. . .
La koro estas
forte ligita

kun la tero.
Vi devas
ĝin kompreni. . .

La amo
estas kiel floro —
ekfloras
kaj mortas
kun ni.
La rememoroj
restas kaj vivas,
por ili ne estas
tago kaj hor' . . .
Mi volas,
ke vi estu
mia floro,
ke vi kresku
en mia voj'.
Negrave, ke morgaŭ ĉio
estos rememoro,
kaj rememoro
ĉiam estos dolor' . . .

RESPONDO

Eble multe serĉis vi
amon, belon, malavaron.
Eble ilin trovis vi,
sed ĉu ili estis veraj!
Eble multajn amis vi —
bonajn, belajn, simpatiajn.
Eble ĉesis ami vi
eĉ maloftajn ĉarmulinojn.
Eble vi transformo min
en folion superfluan.
Sed memoru ĝis la fin':
vivis vi kun amo mia.

STAMENKA DIMITROVA

TRI OBJEKTIVAJ FRAZOJ

Mirtelo.
Mi neniam vidis mirtelon,
nek erikon,
nek veran metropolon,
nek gangsteron,
kiu estas tiom ordinara en iuj metropoloj
kiel la mirtelo kaj la eriko en certaj lokoj,
kiujn oni povas viziti.
Mi ne vidis la uzinhalegojn de General Motors,
la subteran kablo- kaj kanaltreton de la urbegoj
nek la ĉambrojn malantaŭ la koridorpordoj
en la centra oficejo de la agentejoj de kaŝpolico.
Eĉ unu mi ne vidis el la sennombraj kabanaĉvilaĝoj
de la Sudorient-Aziaj ĝangaloj.
Mi ne konas mian hejmon, la teron,
kvazaŭ iu neniam estus vizitinta sian propran kuir-
rejon,
aŭ pri sia edzo aŭ edzino sciis nur,
ke tiu ĉi ekzistas.

ADALBERTO HULES
(Hungario)

DEZIRAS KORESPONDI

Sovet-Unio

Omsĉenko Natalja — SU-348903 u. Sĉastje, Ukraino
Voroŝilovgradskaja, str. Doneckaja 24/18 — (26-j.,
kun ĉi pri moderna muziko, belliteraturo, artfilmoj).

Kobrina Ljudmila — SU-348021 Voroŝilovgrada, str.
Novostrojnaja 79A/50 (28-j., kun ĉi pri moderna muziko,
angla kaj hispana lingvoj, kuirarto, kolektas BK).

Fateeva Ljudmila — SU-348031 Voroŝilovgrad, kvartal
Seĉenko 63/26 (23-j., kun ĉi pri muziko, kolektas BK
kaj PM)

Vladimir Drobjasko — SU-252127 Kievo, pr. „40-let
Oktjabrja“ 122, korp. 2, kv. 28 (22-j., studento, kun
ĉi pri ĉi, kolektas BK).

LA ALIAJ PRI NI

En n-ro 2—3/1981 de la ruslingva „Informacionnii
buletenej“ (Informa Bulteno) de la Asocio de la Sovet-
tiaj Esperantistoj aperis traduko de la tuta teksto
de „Alvoko al la bulgara popolo okaze de la 1300-jara
jubileo ekde la fondiĝo de la bulgara ŝtato“ el la
ĉi-jara januara n-ro de „BE“.

En la juna n-ro 1981 de la informa organo de Por-
tugala E-Asocio „Revista Portuguesa de Esperanto“
en la rubriko „El eksterlando“ aperis mallongaj anon-
coj, ĉerpitaj el la rubriko „De lando al lando“ de
n-ro 3/1981 de „BE“.

„Jam du jarojn mi abonas „Bulgaran Esperantis-
ton“ kaj kun granda plezuro legas ĝin. . . Mi eksciis
multon pri Bulgario, pri la E-movado, pri interesaj
homoj. Laŭ mia opinio via revuo estas senlaca pro-
pagandanto de E-o. . . Via laboro estas utila kaj
nobla. Mi tre dankas al vi.“

IGOR JAVAJČUK,
Ternopol, USSR

„Ni bone ricevis Vian donacon — la jarkolekton
de 1980 de „BE“ — tre valoran por nia porpaca eks-
pozicio kaj por la ekspozicio dediĉe al la 1300-jar-
riĝo de Bulgario. . . Nuntempe en nia Interklubo
estas konstanta ekspozicio kun materialoj ankaŭ el
„BE“ pri nia kara frata Bulgario, kiun ni tre ŝatas.“

T. ŜUVAJEV,
Tjumen regiono,
Nijnevartovsk, USSR

„La diverstema enhavo de la unuopaj numeroj
de via organo respegulas la klopodojn de la bonvolaj
homoj en la tuta mondo, ankaŭ en Bulgario kaj Federacia
Respubliko Germanio, plibonigi la inter-
popolajn rilatojn, por interkompreniĝo kaj paco.
Ni opinias „BE“ leginda. Via E-organizaĵo pravas
admirindan tradicion en la batalo por paco kaj ami-
keco per la Internacia Lingvo Esperanto.“

Esplora Rondo por Parolspuro,
Wuppertal, FR Germanio

„Kun ĉiu nova numero de „BE“ en la mano mi tre
ĝojas. Min treege ĝojigas legi pri la forta E-movado
en Bulgario kaj pri la heroe pereintaj e-istoj. Mi ŝatas
legi ankaŭ la rakontojn, ĉar vi havas vere tre ta-
lentajn verkistojn.“

J. H. Eriksen,
Hjoring, Danlando

Bulgario

Konstantin Kopanarov, Sofio, str. At. Misketov 2,
1618 — dez. kor. kun ĉi pri problemoj fumado kaj
alkoholismo.

Esperanto-familio, 33-j. ukraino, scienca agronomo,
kaj 31-j. bulgarino, infana pedagogo, deziras korespondi
pri ĉi kun grekaj, francaj, italaj, anglaj kaj finnaj
gesamideanoj, interŝanĝi BK kaj esp-afajn:
Sonja kaj Leonid SENJ, kv. „Piŝmana“, bloko
79, vĥ. B, ap. 17, 5000 Veliko Tŝrnovo.

Iva kaj Neli D. Ivanovi — kv. Emil Markov, str. N.
Kamenov, bl. 254 B, ap. 38, 1680 Sofia (lernantinojn
11a klaso, kun ĉi pri kulturaj kaj lerneaj aferoj).

Ĥristo K. Kanev — str. D. Poljanov 12, 1504 Sofia
(lernanto en 5a klaso, kun ĉi, interŝanĝas BK kaj PM).



ASEN BOSEV—
KAVALIRO DE
„ORDENO DE
LA RIDETOJ“



La bulgaraj infanoj el vilaĝoj kaj urboj tre amas la verkiston Asen Bosev. Liaj verkoj edukas ilin labori, esti honestaj, kreski kuraĝaj kaj ĝojaj. Ili estas tradukitaj en rusan, ukrainan, kazaĥan, tjurkmenan, moldavan, francan, anglan, germanan kaj hispanan lingvojn. La etaj legantoj multfoje havis la okazon interparoli kun Asen Bosev en la radio, en junpioniraj kunvenoj, sur la paĝoj de la junpionira gazeto.

Ĉi-foje, kvankam foreste, mi renkontigos vin, miaj junaj amikoj, kun via amata verkisto pere de nia konversaco:

— KAMARADO BOSEV, EN 1980 VI ESTIS DISTINGITA PER LA INTERNACIA «ORDENO DE LA RIDETOJ» PRO VIA TUTA VERKARO. ANTAŬ KELKAJ JAROJ EN BULGARIO TIUN ĈI DISTINGON RICEVIS LA VERKISTINO DORA GABE. MI SCIAS, KE TIU ORDENO PREZENTAS RIDETANTAN SUNON. EONVOLU. RAKONTU IOM PRI ĜI.

— La ideo por esti aprobita kaj kreita la ordeno apartenas al iu pola infano, kiam iu verkistino vizitis ĝin en la malsanulejo. La ridetanta suno estas ankaŭ ideo de infanoj — laŭ infanaj desegnaĵoj. Per tiu «Ordeno de la ridetoj» oni distingas personojn, kontribuantajn al la feliĉo de la infanoj: kuracistojn, sciercistojn, aktorojn, verkistojn, pentristojn, sociopolitikajn agantojn, k. a. En 1980 per la «Ordeno de la ridetoj» estis distingitaj 16 personoj. Ĝenerale la infanoj decidas, al kiu la ordeno estu aljuĝita pro gravaj kontribuoj al la feliĉo kaj prospero de la tutmonda infanaro. Tiamaniere la infanoj esprimas sian amikecon, honoron kaj dankemon al siaj pli maljunaj amikoj el diversaj partoj de la mondo. Jen amuza detalaĵo: ĉe la ricevo de la ordeno la dekorito devas eltrinki tutan glason da citrona suko kaj tuj ekrideti! . . .

— NUN MI PETAS VIN DIRI AL MI ION PRI VIA
VERKARO. KIOM DA LIBROJ VI VERKIS?

— Ili jam estas pli ol 70. La duono de ili enhavas humoraĵojn kaj versaĵojn, kiujn la junaj legantoj akceptas plezure, ĉar tiuj verkoj alportas al ili ridetojn. . .

Ĉi-momente la verkisto montris al mi desegnaĵojn de liaj herooj, donacitajn al li en urbo Ruse dum la renkontigo, organizita kun li kaj la infano-membroj de la klubo «Internacia Infana Asembleo «Standardo de l' paco». Tio donis al mi la argumenton demandi lin pri liaj renkontigoj kun infanoj en la provinco.

— Antaŭ nelonge mi estis en urbo Svilengrad, kie ĉi-jare oni dediĉas al mia verkaro la tutan majon. Mi vizitis ankaŭ la urbon Stara Zagora kaj vilaĝon Spasovo. Dum ĉiuj renkontiĝoj ĉie mi renkontadis infanan ridetojn.

Mi estas tre fiera kaj ĝoja pro mia distingo per la «Ordeno de la ridetoj» kaj pro la konscio, ke ankaŭ mi havas modestan kontribuon al la infana feliĉo kaj la infanaj ridetoj.

Intervjuis : LJUDMILA PASPALEEVA

ASEN BOSEV

SUNO

Al frateto kara
la suno similas,
ĝi neniam ploras,
klara ĉiam ridas.

Antaŭ infanetoj
ĝi leviĝas frue
kaj en riveretoj
lavas sin unua.

En florantaj arboj
per tuketo blanka
ĝi sin viŝas. Same
ni nin lavas ankaŭ.

Sur fenestroj niaj
la suno ekflamas —
frulevigajn homojn

[a [c c c c c] u u u u u u u u]

distroj



ANEKDOTOJ
PRI
GABROVANOJ

NE SUFIĈE ALTA

Gabrovano eniras hotelon kaj demandas pri la prezoj de la litoj.

— En la unua etaĝo — 5 levoj, en la dua — 4, en la tria — 3 levoj kaj en la kvara — 2 levoj — respondis la hotelestro.

— Dankon — diris la gabrovano kaj eliris.

— Sed kial vi eliras? — diris la hotelestro. — Niaj prezoj estas sufiĉe malaltaj.

— Jes, vere, sed via hotelo ne estas sufiĉe alta!

NUR INFORMIĜAS

Gabrovano elvagiĝas en la stacidomo kaj demandas laŭ la fiakriston:

— Kiom kostas la veturado ĝis la centro de la urbo?

— Du levojn. Bonvolu!

— Dankon. Mi nur demandis, por scii kiom mi ŝparos irante piede.

AKURATA PAGANTO

Oni demandas la kelneron en Gabrova restoracio:

— Kial vi ne forpelas eksteren tiun ĉi dormantan viron? Mi rimarkis, ke vi jam kelkfoje vekis lin kaj li denove ekdormas.

— Kial forpeli lin? Ĉiufoje, kiam mi vekas lin, li demandas pri la konto kaj akurate pagas.

MALNOVA ŜULDO

Post operacio de la tonsiloj, la kuracisto diris:

— Tiu operacio de via edzino devis esti farita antaŭ multaj jaroj, kiam ŝi estis infano!

— Tiam sendu la konton al ŝia patro — respondis la gabrovano.

KREAJ TURMENTOJ

Mi ricevis leteron de la redakcio:

«Via materialo ne estas bona. La penso ne estas interesa.»

Mi faris ĝin interesa. Ricevis respondon:

«Ne estas lnda por publikigo. Pli multe laboru super la lingvo.»

Mi laboris. Forsendis. . .

«La komenco estas malbona.»

Mi ĝin plibonigis.

«La fino estas malkontentiga.»

Mi ŝanĝis ĝin.

«Ne ekscitas.»

Mi faris ĝin ekscita.

Mi iris al la redaktoro, petis lin trovi lokon.

«Vi devas ĝin multe mallongigi»

Mi ne kontraŭis.

«Unue necesas pagi monon al la kaso, por ke oni aperigu vian verkon»

Mi pagis. Kaj jen finfine oni publikigis:

«Anonco: Perdita hundeto de blanka koloro. Bonvolu redoni kontraŭ rekompenco. La adreso. . .»

Tiel por la unua fojo oni aperigis mian verkon.

O. SOSNICKIJ

(El ukraina lingvo tradukis
S. Pogorelaja)

VORTENIGMO

14	1	12	18	16	1	7
2	15	18	3	8	3	18
16	2	19	2	8	4	2
12	8	2	13	3	9	4
15	8	1	11	4	8	2
13	3	6	5	13	10	3
16	3	17	18	3	18	4

8, 3, 15, 5, 6, 4 — Unu el la plej longaj riveroj en Eŭropo.

13, 2, 19, 4 — Monunuo de Balkana ŝtato.

12, 5, 16, 3, 11, 3 — Ne perdanta la trankvilon.

18, 3, 15, 10, 16, 3 — Bulgara antikva dio de la ĉielo.

17, 3, 13, 14, 4 — Antikva paŝtista fluto.

4, 9, 1, 7, 4 — Profesia okupo konsistanta en plenumo de iu servado.

Post la trovo de la vortoj, traskribu la literojn laŭ ties nombro en la ĉelojn de la malsupra kvadrato kaj vi tralegos frazon.

Verkis: MARIN BACEV

EKSPEDICIO „PLANKTON-5“ FINIĜIS SUKCESPLENE



Jana, Julia kaj Donĉo Papazovi venkis la mondan oceanon...

Antaŭ jaroj ili estis nur du — Julia kaj Donĉo Papazovi, muzikistino kaj ekonomiisto, enamigintaj en la maro kaj revantaj pri longdistancaj marveturadoj per jaĥto... Unue estis timemaj provoj: resti dum tagoj en la maro sur izola boato kaj nutriĝi per alĝoj. Poste venis la unua veturado tra Nigra Maro. La provo estis kuraĝiga. Helpitaj ĉiufanke de la ŝtato, sub la aŭspicio de scienc-esploraj kaj kulturaj institucioj kaj de la bulgara marnaviga estro, Donĉo kaj Julia faris la unuan por Bulgario ĉirkaŭmondan marveturadon per la jaĥto „ĜU“. Tiu rimarkinda heroaĵo, realigita de maristoj-amatoroj (des

pli — virino, tre delikata, sur bordo!) glorigis kaj famigis Bulgarian, kiel patrulojn de aŭdacaj jaĥtistoj kaj vicigis ĝin inter la mondan familion de maresploristoj... Multajn ege valorajn observojn pri la konduto de familia paro izolita dum longa tempo de la soci-medio kaj pri reĝimo de nutrado en marmezo, kaj ankaŭ pri la psika stato de la izolaj marvojaĝantoj alportis kun si Donĉo kaj Julia Papazovi. Iliaj nomoj estiĝis simbolo de aŭdaco kaj eltenpovo, estis jam tutmonde konataj. Altiĝantaj ŝtataj distingoj ornamis iliajn brustojn.

La eksperimentoj ne ĉesis. La geedza paro entrepre-

nis novan, ĉirkaŭmondan, riskan marvojaĝon kun speciala novkonstruita jaĥto „TIVIA“ sub la aŭspicio de la Bulgara Televido. Ĉi-foje sur la bordo de la jaĥto estis nova membro de la ekipaĵo — la seĝara filineto de Donĉo kaj Julia Papazovi — Jana. El la kajo de la antikva bulgara havenurbo Sozopol „Tivia“ fornavigis al sia ĉirkaŭmonda marveturado.

Komenciĝis ekspedicio „PLANKTON-5“.

Dum 777 ŝtormaj kaj sunaj tagoj, solaj en la monda oceano, la triopo Papazovi kuraĝe luktis kun la malfacilaĵoj de la marveturado, multfoje riskante sian vivon, plenumante akurate la starigitajn taskojn kaj celojn de la ekspedicio. La bulgaraj kaj mondaj amas-komunikiloj zorgis pri la ekspedicianoj kaj pri iliaj travivaĵoj kaj informadis la socion pri ĉiu mejlo de la jaĥto „Tivia“.

Je la 14a de junio ĉi-jare Sozopol solene renkontis la heroan ekipaĵon de „Tivia“. La nova venko de la bulgaraj jaĥtistoj estis tutnacia festo, sed antaŭ ĉio — festo de sozopolanoj, iliaj plej bonaj, intimaj amikoj, kiuj atendis ilin sur la sama kajo, el kiu ili direktiĝis al la nekonateco...

D. ĤITROV

Revuo „Bulgara Esperantisto“, fondita en 1919, distingita per la ŝtata ordeno „Kiril kaj Metodij“ — I grado. Eldonkvanto — 6100. Adreso de la redakcio: Bul. Ĥristo Botev 97, 1303 — Sofio, Bulgario. Tel. 31-00-29, 32-40-68. P. K. 66 — 1000 — Sofio.

Sur la unua kovrilpaĝo: la Domo—monumento de BKP sur montopinto Buzluĝa.

